MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN VLAAMSE ESPERANTO-BOND

JARKOLEKTO
JAARGANG 2 N° 3 MA/APR. 1982 15 APR. 1982

# Informilo

+ ORGANIGRAMO

+ PROTOKOLO JARKUNSIDO 13.03.82

VERANTW. UITGEVER
RESPONDECA ELDONANTO JAN BOVENDEERD, SPEELTUINLAAN 14, B-2510 MORTSEL

## I N F O R M I L O

Kadrogazeto. Aperas ĉiu-monate, krom en julio kaj aŭgusto.

Abono : BF 100,- jare

## F E L - Ŝ P A R K O N T O

### FIKSDATAJ MONDEPONOJ

Minimumaj sumoj : BF 5.000,-

Minimuma periodo : 2 jaroj

- ĉu per pago en unu el la kontoj :
  402-5510531-55
  000-0265338-43
  menciante : DEPONO
- ĉu rekte al la Direktoro de ESPERANTO-CENTRO ANTVERPENO

## LIBRO-SERVO SONORILO

Doornstraat 22
2610 WILRIJK

Direktoro : Monique VEREECKEN

Telefono : 031/27 24 05

Kontoj : 000-0152140-44
320-0342460-23

FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Arsenaalstraat 5
2000 ANTWERPEN

Telefono : 031/16 05 05

Direktoro : Paul PEERAERTS

FEL-estraro

Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT
031/66 62 66
prezidanto, estrarano pri informado, planado, agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK
031/27 24 05
vic-prezidanto, estrarano pri financplanado

Jules VERSTRAETEN, St Bernardsestwg 1078
2710 HOBOKEN
031/27 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14
2510 MORTSEL
031/49 50 06
ĝenerala sekretario, estrarano pri administrado kaj edukado

Fernand ROOSE, St Klaradreef 59
8000 BRUGGE
050/33 19 81
estrarano pri kulturo, respondeculo por Okcident Flandrujo.

Marie Thérèse HENQUINEZ, Lipsestraat 166
2991 TILDONK
016/23 61 90
respondeculo por Brabanto.

Guido SCHROEYERS, Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN
011/53 64 10
respondeculo por Limburgo

Kristin TYTGAT, St Hathebrandstraat 8
2510 MORTSEL
031/49 50 24
Kontaktoj kun la junularo (FLEJA)



# P R O T O K O L O

pri la ĝenerala jarkunsido de sabato 13-a de marto 1982 en Kastelo de Ham en Steenokkerzeel.

Prezidas : Edward Symoens

Protokolas : Jan Bovendeerd

Komenciĝo : 10.00 h.

En sia enkonduko, la prezidanto atentigas pri la valoro kunsidi en Kastelo de Ham, senpage metita je la dispono de FEL de la Ministerio pri Nederlanda Kulturo. Tiuj kunsidoj ne pasas nerimarkite, ĉar la ministerio ricevas la necesajn raportojn pri tio, kio okazas en la kastelo.

## I. ADMINISTRANTARA PARTO

1. Raportado.

1.1. FINANCOJ

1.1.1. S-ro Verstraeten en ĝenerala superrigardo atentigas pri la "truo" en nia kaso, truo kie devas iel esti ŝtopita. Li tamen ne tuj vidas eblan ŝtop-eblecon.
Necese estas samtempe pli----altigi la enspezojn (ekzemple pere de altiro de kiel eble plej multe da novaj membroj/simpatiantoj) kaj malaltigi la elspezojn ..

1.1.2. S-ro Peeraerts detaligas la ciferojn de la bilanco.
Jen por komenci la ciferoj.

Provizora Bilanco 1981

| A K T I V O J | | | P A S I V O J | |
|---|---|---|---|---|
| KB kuranta konto | 160.727 | | Kreditoroj | 44.714 |
| KB deponkonto | 201.000 | | Prunteprenoj | 953.956 |
| Poŝtĉekkonto | 65.178 | | Ricevita por 1982 | 94.296 |
| Kaso | 14.113 | | | |
| Likidoj | | 441.018 | Saldo de 1980 | 650.564 |
| Maŝinoj | 1.777.966 | | Pagita en 82 por 81 (°°) | 892 |
| Translokiĝkostoj | 297.142 | | Deskriboj | 415.022 |
| Stokoj | 288.100 | | | |
| Garantiaj sumoj | 66.600 | | | |
| Mallikidoj | | 2.429.808 | | |
| Debitoroj | | 180.186 | | |
| Pagita por 1980 | | 3.884 | | |
| Ricevita en 82 por 81 (°°) | | 148.212 | Saldo de 1981 | 1.043.664 |
| | | 3.203.108 | | 3.203.108 |

(°°) Tiuj ĉi ciferoj povas ankoraŭ ŝanĝiĝi. Tio tamen ne tre forte influos la bilancon.

1.1.3. Rilate al tiu ĉi bilanco, ni tamen memoru, ke ĝi ne koncernas nur FEL. Nome, kaj GCA (= UEA) kaj FEL trairas la saman librotenadon.

1.1.4.1.S-ro Durwael sin demandas ĉu UEA rajtas lasi FEL kun deficito, ĉar ja GCA estis ebla nur dank al FEL.

1.1.4.2. Jes kaj ne, opinias PP. Ĉar FEL same profitas de GCA kiel GCA de FEL. Ekzemple, por akiri laborfortojn el la BTK (Bijzonder Tijdelijk Kader/ Speciala Portempa Kadro) devas esti minimume unu salajrata oficisto. Tio do eblas nur, dank al GCA.

1.1.4.3. S-ro W. De Smet proponas sendi al UEA rekomendon por ke ĝi subtenu FEL en tiuj ĉi malfacilaj cirkonstancoj. Li mem, kiel komitatano de UEA, pretas defendi tion ĉe UEA.

1.1.4.4. ID tamen nenion atendas de tio, ĉar la afero dependas de KFA (Komisiono pri Financoj kaj Administrado).

1.1.4.5. La prezidanto atentigas pri tio, ke oni jam ofte priparolis tion; ke oni daŭre serĉas la necesan ekvilibron.

1.1.5.1. PP altiras la atenton al tio, ke la BTK-anoj ne plu estas senpagaj kaj ke UEA akceptis pagi ĉiujn tiurilatajn kostojn.

1.1.5.2. UEA do jam serioze helpas al FEL.

1.2. G.C.A. (Grafika Centro Antverpeno) (raportas P. Peeraerts)

1.2.1. GCA okupas 10-o da personoj, el kiuj unu plentaga oficisto (PP), unu duon-taga (Gerd Jacques), la aliaj estantaj ĉu kontrol-liberigitaj sen-laboruloj, ĉu BTK-anoj.

1.3. FLEJA - vidu apartan protokolon.

1.4. ILEI (raportas E. Symoens)

La situacio ne estas kontentiga. Ĉiuj landaj asocioj serĉas novajn impulsojn. Tamen, la ne-funkciado aŭ ne-efiko estas fakte nur ŝajna, certe en Belgio.

Ekzistas agado, kvankam ne rekta. Oni sin preparas, kune kun UEA kaj diversaj Landaj Asocioj de UEA, al vasta kampanjo en la instrumedioj, al vera ofensivo amasa, translima, samtempa.

Tial estas necesaj nacilingvaj dokumentoj. Tiuj dokumentoj estas nun preparataj.

La ofensivo startos en 1983, ĉu kun aliaj, ĉu de FEL sola, sed ĝi okazos !

1.5. E.E.C. (Eŭropa Esperanto-Centro) raportas Anne Tilmont.

EEC nuntempe preparas Eŭropan Tagon por la UK. Al tiu estos invititaj la Euro-Parlamentanojnkaj aliajn funkciulojn el Eŭropaj medioj.



1.6. Jarraporto de la sekretario.

Estimata Sinjoro Prezidanto,

Depost la pasintjara ĝenerala jarkunsido okazis kelkaj aferoj, kiujn ni eble povas listigi por ne devigi tralegadon de ĉiuj protokoloj ricevitaj.

La aferoj pri kiuj okupiĝis la estraro estas inter aliaj,en la sinsekvo de ilia okazo :

1. kreado de speciala ŝparkonto : la "Fiksdataj Mondeponoj", kiu tamen ne havis sukceson, ĉu pro maltro da reklamado, ĉu pro manko de intereso
2. eldonebleco de verko de Rik de Roover, nome lia infanromaneto "LA AVENTUROJ DE ŜPAR- KAJ ALIA PORKO".
3. organizado de kadrokursoj por formigo de kursgvidantoj, kunvengvidantoj kaj propagandistoj
4. preparado de broŝuro "ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO",cele al uzado en niaj kursoj kaj pri kiu ekzistas interesiĝo ankaŭ eksterlande.
5. kreado de INFORMILO, unue pro ŝparemo de afrankoj, poste por retrovi kontaktojn kun nia membraro en formo de revuo
6. preparado de broŝuro pri la pedagogia valoro de Esperanto, sed tio estas fakte via persona laboro
7. serioza kunlaboro kun la junularo - nia estonto
8. reorganizado kaj centralizado de la ĝenerala administrado
9. plisimpligo de la kotiz-sistemo, kvankam tio ŝajne ne estas je ĉies kontento
10. redaktado de kontrakto inter Institucio Hodler, GCA kaj FEL samkiel inter UEA, GCA kaj FEL
11. kreado de eldonkonto, kiu ankaŭ ne konis grandan sukceson
12. kreado de eldon/traduk-komisiono
13. organizado de oficiala koresponda kurso
14. laste, sed certe ne malpli, la preparado de la UK 1982 pere de, kaj tion ni devas iomete bedaŭri, nur kelkaj aktivaj personoj !

Krom tio estis aliaj eventoj kuraĝigaj, kvankam ne nepre pro agado nia, nome :

1."Hoger Instituut voor Vertalers en Tolken" el Antverpeno organizis por-Esperantan programon
2. Institucio Hodler aljuĝis al FEL ian subvencion
3. FABE (Flandra Ligo de Blindaj Esperantistoj) aliĝis al FEL.

4. ekestis kunlabor-konsento kun la Laborista Esperanto-grupo "ANTAŬEN" el Deurne
5. OPE (Organisation du Peuple Européen - Organizo de la Popolo Eŭropa) akceptis Esperanton kiel laborlingvon apud la Franca kaj la Angla kaj prikonsideras partoprenon en la venonta UK
6. OPE ankaŭ petis al FEL akcepti respondecon kiel delegito en OPE
7. AFS (American Field Service), tiu asocio, kiu okupiĝas pri restadinterŝanĝo translima de junuloj, apelaciis al Esperanto por alfronti lingvajn malfacilaĵojn kun Orient-Eŭropo. Kadre de tio, cetere, la Belga Esperanto Junularo ricevis kunlaborpeton kaj agadterenon kun Hungario.
8. ekesto de agado en Oostende
9. ebleco je publikigado de Esperanto-kursoj en lokaj gazetoj en Limburgo kaj Gento
10. Internacia Ligo por Besto-rajtoj intencas uzi Esperanton kiel laborlingvon

Malpli kuraĝigaj konstatoj estas ke :

- niaj klopodoj trovi en Orient-Flandrio ian intergrupan kunlaboron sub la respondeco de unu provinca respondeculo, kiel en aliaj provincoj, ne sukcesis
- la promeso krei plian kernon en Orient-Flandrio (Lokeren) ne realiĝis
- kvanto da personoj sin anoncis kiel reprezentanton de FEL, sed eĉ ne konsentis memmembriĝi, tiel ke ni devis konsideri ilin ne seriozaj kaj denove forstreki el nia organigramo.

Pli malkuraĝiga ankoraŭ estas la konstato, ke nia agado kostas tiom da mono. Normale ĝi estus subvenciata de la ŝtato, sed tiu ĉi mem ne plu havas monon kaj do pagas la subvencion, je kiu ni povus pretendi, nur malgrandparte kaj eĉ ne sen prokrasto.

Retrorigardante kaj iomete adiciante la partojn kiujn la ŝtato jam ne pagis, ni povas konkludi, ke nia hodiaŭa deficito estas ĝuste tiom, kiom la ŝtato ĝis nun ne pagis !

Eble ni pli bone ne plu kalkulu je tiuj subvencioj - kiel jam proponis S-ro Verstraeten - kaj, kiam ili tamen venos, konsideru ilin kiel ekstran ŝancon. El tio sekvas tiam, ke ni mem zorgu pri la financado de nia agado, ke ni mem trovu la necesajn fontojn aŭ ... redukti nian agadon. Sed tio signifus, ke tio, kion ni ĝis nun sukcesis, denove stagnos el kio sekvos ke ni perdos denove parton de tio, kion ni eventuale ankoraŭ povus esperi de la ŝtato ... la bone konata "diabla cirklo", do.



Kiel do finfine alfronti tiun problemon ?

Fakto estas, ke unuflanke la ne- aŭ malbona pago fare de la ŝtato kaj aliflanke ke certaj ŝuldoj ne estas pagataj kaŭzas al ni deficiton, kiu sumiĝas je proksimume 1/3 de nia tuta buĝeto ! Situacio, el kiu sekvas, ke se ni ne trovos la necesajn monrimedojn alimaniere, ni verŝajne devos fermi niajn pordojn en ne tro fora estonteco.

Kiel diris kolonja karnaval-oratoro :

" Nur kanguruoj kapablas fari grandajn saltojn kun malplena poŝo".

Mi ne scias, ĉu niaj administrantoj bone komprenas la situacion, ĉu ili konsciiĝas pri ĝi, sed mi emfazas, ke mi tute ne ŝercas ! Male !

El ĝenerala vidpunkto, restas ĉe mi kelkaj demandoj.

Ekzemple, ĉu ni, en la estraro, ne volas fari tro bone ? ĉu ni ne volas agadi tro idealisme ?
La aforismo : "Dum cerbumis idealistoj, venkis realistoj".
Kiam ni, antaŭ kelkaj jaroj, transprenis la torĉon de la movada gvidado, ni tuj komencis renovigi, readapti la tutan movadan konstruaĵon, de la tegmento ĝis la fundamento. Ni reorganizis, ŝanĝis, adaptis, plibonigis, pli-simpligis tiel, ke finfine ni estis okupataj transpreni la tutan administradon de la movado, centralizi la kompletan administran laboron.

Plifaciligo, do, de la laboro, kun la espero evidenta, ke sur loka nivelo niaj homoj povus uzi siajn fortojn por aliaj taskoj.

Tamen, ĝuste tie, mi faras al mi la demandon ĉu, forprenante la financajn zorgojn de la lokaj kasistoj, ni ne forprenis de ili ilian nuran por-Esperantan laboron, ilian nuran kontakton kun la membroj de sia grupo.

Ĉu ni, per tro bona laboro, ne efikus kiel ia puteatra ludo, en kiu la pupoj evidente estas la estraranoj kaj la spektantoj la membroj, kiuj jes kun multe da intereso rigardas kaj eĉ aplaŭdas ĝustamomente, sed plue restas konforte en sia fotelo atendantaj ...

Mi kuraĝas esperi, ke en tio mi troigas, konstatis eĉ ke en certaj lokoj la agado pliviglîĝis. Tamen mia dubo restas por la cetero.

Alia ekzemplo : malgraŭ - aŭ eble ĝuste pro la ekonomia krizo - ni malpliigis la membrokotizojn, unuformigis ilin, kompreneble ne por malpliigi niajn enspezojn sed por altiri pli da membroj, pli da simpatiantoj el kiuj poste povus veni veraj esperantistoj. Ĉu niaj reprezentantoj ankaŭ komprenis la aferon tiel ? Mi multe dubas, suspektas eĉ ĉe niaj propagandistoj ian mankon de kuraĝo por

alproksimiĝi al la homoj kun tia peto. Se tiel estas, kompreneble nia intenco fiaskis.

Mi plie suspektas ĉe niaj administrantoj kaj reprezentantoj, ke ili atendas de ni, ke ni ĉion faru. Jen fakte kie, laŭ mi, estas la tubero de la afero aŭ, por ĝin diri laŭ flandra maniero, "jen, kie pinĉas la ŝueto".

Oni atendas tro de ni. Oni ŝajne havas ian emon forsinki en fotelo de la letargio, forsinki en ia stato de beateco, sciante ke aliaj jam faras la laboron. Kaj pri tio kulpas ni, volante fari tro bone, dum ni finfine en realeco komplete dependas de la bona volo de la aliaj.

Aŭ ĉu eble kulpas pri tio nia Esperanto-Centro, konsiderante, ke tie tamen estas homoj pagitaj, kiuj havas nenion alian por fari ... ?

Mi ne tro bone scias, sed memoras ankoraŭ bone la vortojn de Marc Van den Bempt okaze de provinca kunsido en Loveno : "La tasko de FEL-estraro ne estas propagandi Esperanton. Tio jes apartenas al la grupoj. FEL, kiel landa asocio, devas gvidi, konsili, helpi la grupojn kaj la grupoj respondecas pri la kontaktoj kun la ekstera mondo."

Li pravas laŭ mi.

Cetere, estis en tiu ideo-ĉeno, ke ni organizis la kadrokursojn; por formiĝi Esperanto-instruantojn, kunvengvidantojn (animatorojn, por uzi la terminon de la ministerio) kaj propagandistojn.

La unua krusoserio finiĝis kaj, por konsciiĝi pri ilia valoro, por scii ĉu ili sukcesis, kunvenis kelkaj partoprenintoj kaj gvidintoj de la kursoj por esplordebati. Ni klopodis trovi respondon al serio de demandoj, el kiuj jen kelkaj :

1. - Ĉu la kursoj estis necesaj, ĉu indis ilin organizi ?

   La respondo estis "Jes, ĉar nun la partoprenintoj ne plu agas senpripense. La lernitajoj pensigas ilin.

2. - Ĉu la kursoj atingis sian celon ?

   Tiu demando fakte estas plilongigo de la unua.
   Se la celo estis meti la interesitojn sur la bonan vojon al mem-formado, ili jes sukcesis, kiel aperas el la unua respondo. Oni nun pensas antaŭ ol agi. Cetere, estis inter ni kiuj multe lernis, inter alie pri la movado..



3. - Ĉu la kursoj entenis ĉion necesan ?

   La enhavo estis : metodiko/didaktiko, historio, literaturo, parol-, kunven- kaj debat-teknikoj, komunikado/informado.
   Tio ŝajnis al ĉiu sufiĉa por niaj bezonoj, kvankam oni povus enŝovi eble ankaŭ la lingvon mem, por interparoli specifajn problemojn, kiuj povas sin prezenti al kursgvidantoj. Aliflanke, oni povus en venonta serio iomete pli detale pritrakti aferojn, kiuj nun estis eble iom tro ĝeneralaj.

4. - Ĉu ni daŭrigu ?

   Respondo unuanima : Jes, ĉar ili estas necesaj !

Jen kio pruvas, ke ni jes sufiĉe penas por la gvidado, helpo, konsilado de niaj lokaj respondeculoj. Ni do nun esperu, ke ili akceptu tiun taskon kaj ekagu.

Tio, kion mi volus fari nun, estas alvoki al pli ĝenerala partopreno en la kadrokursoj. Ŝajnas al mi, ke tut-unua-loke, niaj administrantoj kaj reprezentantoj devus sekvi ilin, ke ĉiu grupo sendu almenaŭ unu personon al ili por ke estonte niaj ĝeneralaj kaj administrantaraj kunsidoj povu akiri iom pli altan nivelon, por ke estonte ne plu estu miskomprenoj, por ke ĉiu havu iom pli bonan scion pri la movado kaj pli sukcese povu plenumi la necesajn taskojn.

Ni nepre ne forgesu la centjariĝon de la Esperanto-movado en 1987 kaj preparu nin al kiel eble plej bona festado, kvankam mi denove devas atentigi pri la vera necerteco rilate al niaj monrimedoj, pri la ebla forfalo de la ŝtataj subvencioj kiuj siaflanke iĝas pli kaj pli dubaj.

Tamen, malgraŭ ĉio mi kuraĝas esperi. Esperi, ke niaj administrantoj, reprezentantoj kaj gemembroj konsciiĝu pri la stato de nia afero, ke ili interesiĝu pri la necesa laboro kaj ke ili helpu nin alfronti la defion.

Ni ne forgesu, ke la movado ĉiam devis alfronti malfacilajn cirkonstancojn. Ni ne forgesu ankaŭ, ke antaŭ iom pli ol 90 jaroj, D-ro Zamenhof tute sola, sen ia ajn helpo el ia ajn ŝtata subvencio, financis kaj tute sola faris la tutan laboron. Se tio povas ion signifi al ni, ni eble tie trovos la necesan kuraĝon, la necesan forton por igi la aferon sukcesi.

Rigardante al tio, eble estas al mi permesate proponi jenan agadplanon por la estonteco, agadplanon kiun ni fakte jam klopodas realigi de antaŭ kelka tempo, agadplanon kiu okupas nin jam delonge, sed kiu eble tamen estu plian fojon memorigita, por finfine sukcesi.

rilate al la detaloj

Kvankam mia ideo ankoraŭ ne plene maturiĝis, mi tamen volas jam komuniki ĝin al vi.

Ĝi renkontiĝas kun la ideo de UEA-prezidanto G. Maertens (eksterigi nian movadon) kaj kun via, S-ro Prezidanto (kunigi la fortojn).

Nenecese emfazi, ke por "eksterigi" ni devas esti interne fortaj. Por esti interne fortaj, ni devas kunligi ĉiujn fortojn, sed ... orde.

La tuto estas tre simpla en si mem kaj permesos eĉ sukcese alfronti la problemojn.

Ni jam konstatis, ke en multaj kazoj, la distanco inter la membraro kaj la estraro, kiun ni deziris plimalgrandigi, anstataŭ reduktiĝas, pli kaj pli grandiĝas.

Kial ?

Ĉar ni altiris ĉion al la estraro, al la kern-estraro fakte, al la Esperanto-centro, kiu ĉion faras.

Jen baza eraro, laŭ mi.

Persone mi jam spertis, ke nenio efikas pli malkuraĝige ol manko de kontakto, manko de intereso ŝajne. Ne sufiĉas esti certa, ke la "afero" bone funkcias, ke la "aliaj" bone laboras. Se mankas kontaktoj, personaj kontaktoj, malŝtreĉiĝas la atento, forŝoviĝas la persona instigo, fortiĝas la sento de ne-neceso; oni sentas sin forgesata. (L A granda sindromo de la maljunaĝo, ekzemple).

Forigu la kontaktojn kaj vi forprenas la entuziasmon, favoras la malkuraĝiĝon, malinteresiĝon, de-kroĉadon.

El tio ni tamen ne komprenu ke pri tio respondecas nur la estraro de FEL. Certe ne ! La ĉefaj respondeculoj tiurilate troviĝas en niaj lokaj grupoj.

Nia solvo troviĝas laŭ mi en taŭga - tre simpla en si mem - organizado ... tute laŭstatute eĉ !

Kaj jen finfine la propono, kiun ni jam delonge pripenas.

Ni laboru laŭ sektoroj de interesiĝo en la sino de FEL mem. La estraro estu kerno, kiu disradias kaj kuntiras samtempe, estu la kroĉilo inter nia membraro kaj UEA, la vera kerno.

Kiel ?

La elektotaj estraranoj dividu inter si la diversajn taskojn laŭ kompetento kaj interesiĝo. Tio cetere jam estas fakto de la antaŭa laborjaro.

Nun, anstataŭ resti sola en sia taskaro, ĉiu estrarano kunmetu komisionon ekzemple el la kadro-membroj. Unua nombro de kadromembroj ja jam ekzistas

## Orient-Flandrujo

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ESPERANTO AALST<br>Raffelgemstr. 16/38<br>9300 AALST | Robert DEBONDT<br>V.de Saedeleerstr 30<br>9300 AALST<br>053/70 25 13 | Myriam WATERINCKX<br>Raffelgemstr. 16/38<br>9300 AALST<br>053/77 33 79 | Maurice DEWIT<br>Ninovestraat 157<br>9440 EREMBODEGEM<br>053/70 53 68<br>068-0679940-94 | Myriam WATERINCKX | |
| EREMBODEGEM | | | | | Erik D'HONDT<br>Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM<br>053/77 44 97 |
| GENTA KLUBO<br>Belgradostraat 43<br>9000 GENT | Adh.VAN DE VELDE<br>Belgradostraat 43<br>9000 GENT<br>091/23 56 40 | Adh. VAN DE VELDE | A. VAN DE VELDE<br>440-0680421-38 | A. VAN DE VELDE | |
| LA PROGRESO<br>Buffelstraat 1<br>9000 GENT | Yvonne VELGHE<br>Brusselsestwg 385<br>9219 GENTBRUGGE<br>091/30 13 01 | | Adolf DE MULDER<br>Nekkersputstr.106<br>9000 GENT<br>091/26 17 93<br>000-1098268-34 | A. Lödör<br>Brusselsestwg 385<br>9219 GENTBRUGGE<br>091/30 13 01 | |
| 9550 HERZELE | | | | | Robert DAEM<br>Kruisveldstr.9/2<br>9550 HERZELE<br>053/62 64 96 |
| 9400 NINOVE | | | | | R. STEENHOUDT<br>Pamelstraat 296<br>9400 NINOVE<br>054/33 59 71 |
| 9700 OUDENAARDE | | | | | Stephaan d'HAEYER<br>Rekkenstraat 4<br>9700 OUDENAARDE<br>055/31 35 61 |

Kvankam mia ideo rilate al la detaloj ankoraŭ ne plene maturiĝis, mi tamen volas jam komuniki ĝin al vi.

Ĝi renkontiĝas kun la ideo de UEA-prezidanto G. Maertens (eksterigi nian movadon) kaj kun via, S-ro Prezidanto (kunigi la fortojn).
Nenecese emfazi, ke por "eksterigi" ni devas esti interne fortaj. Por esti interne fortaj, ni devas kunligi ĉiujn fortojn, sed ... orde.

La tuto estas tre simpla en si mem kaj permesos eĉ sukcese alfronti la problemojn.

Ni jam konstatis, ke en multaj kazoj, la distanco inter la membraro kaj la estraro, kiun ni deziris plimalgrandigi, anstataŭ reduktiĝas, pli kaj pli grandiĝas.

Kial ?

Ĉar ni altiris ĉion al la estraro, al la kern-estraro fakte, al la Esperanto-centro, kiu ĉion faras.

Jen baza eraro, laŭ mi.

Persone mi jam spertis, ke nenio efikas pli malkuraĝige ol manko de kontakto, manko de intereso ŝajne. Ne sufiĉas esti certa, ke la "afero" bone funkcias, ke la "aliaj" bone laboras. Se mankas kontaktoj, personaj kontaktoj, malŝtreĉiĝas la atento, forŝoviĝas la persona instigo, fortiĝas la sento de ne-neceso; oni sentas sin forgesata. ( LA granda sindromo de la maljunaĝo, ekzemple).
Forigu la kontaktojn kaj vi forprenas la entuziasmon, favoras la malkuraĝiĝon, malinteresiĝon, de-kroĉadon.
El tio ni tamen ne komprenu ke pri tio respondecas nur la estraro de FEL. Certe ne ! La ĉefaj respondeculoj tiurilate troviĝas en niaj lokaj grupoj.

Nia solvo troviĝas laŭ mi en taŭga - tre simpla en si mem - organizado ... tute laŭstatute eĉ !

Kaj jen finfine la propono, kiun ni jam delonge pripenas.

Ni laboru laŭ sektoroj de interesiĝo en la sino de FEL mem. La estraro estu kerno, kiu disradias kaj kuntiras samtempe, estu la kroĉilo inter nia membraro kaj UEA, la vera kerno.

Kiel ?

La elektotaj estraranoj dividu inter si la diversajn taskojn laŭ kompetento kaj interesiĝo. Tio cetere jam estas fakto de la antaŭa laborjaro.

Nun, anstataŭ resti sola en sia taskaro, ĉiu estrarano kunmetu komisionon ekzemple el la kadro-membroj. Unua nombro de kadromembroj ja jam ekzistas



dank' al niaj kadrokursoj.

Siavice, ĉiu komisiono klopodu altiri al si ĉiujn membrojn el sia interesosfero, tiel formante sektoron.

Mi klarigas :

Kial disdividi la movadon en tiom da apartaj asocioj, kiom estas da interesoj, anstataŭ kunigi ĉiujn en unu forta movado ?

Ekzemple, en la sektoro de la "edukado" povus partopreni ĉiu ajn, kiu interesiĝas pri la temo, ĉu li estas aŭ ne estas profesia instruisto, sen pro tio esti devigata aliĝi al iu speciala organizo, kie li devas pagi apartan kotizon..

Kulturo-sektoro povus kunigi en si ĉiujn formojn de kulturo (muzikon, literaturon ktp., eĉ sporton ! ) sen ke pro tio la interesitoj aliĝu al aparta asocio, en kiu, denove, ili devas pagi apartan kotizon.

Se nun, ĉiuj tiuj sektoroj agadus, ni diru, aŭtonome, ili tamen restus ligitaj al unu (kaj unu devas sufiĉi ! ) landa asocio pere de la komisionoj.

Ni, ĉe la bazo, devas kompreni :

- ke Zamenhof kunmetis la lingvon kiel komunikeblecon por Ĉ I U J,
- ke ekzemple sciencistoj havas alian viv-koncepton ol laboristoj, sed ke ili tamen devas esti egalrajtaj
- ke ni devas respekti ĉies opinion kaj do krei la eblecon je disvolviĝo de ĉiuj interesoj,
- ke ni povas tion bone fari nur pere de komuna agado
- ke nia movado povas esti forta nur se ni kunligas ĉiujn fortojn
- por trovi solvon al niaj problemoj, nia intereso troviĝas tie, kie renkontiĝas ĉiuj tiuj fortoj.

Praktike tio resumiĝas al la jeno :

La estraro elektota de la ĝenerala kunsido povas esti limigita al nura kern-estraro, kies anoj akceptu respondecon pri certa(j) tasko(j).
Ili trovu la necesajn kadromembrojn por la formado de komisiono, rilate al ekz.
- administrado/organizado
- financado/financplanado.
- informado, edukado, kulturo, agado (loka, provinca, landa)
- turismo (tre grave, sed nepre ne konfidenda al nur unu sola persono !)

Tiuj komisionoj prilaboru la tutan terenon en rilato kun sia tasko/temo, ili formu sektorojn, do.

Ĉiu komisiono ellaboru planon kaj se eble realigu ĝin, eventuale se necese post submeto, pere de la komisionestroj, al la kernestraro, ekz. kiam temas pri financado aŭ - kiu scias ? - speciala karaktero.

La kernestraro cetere havas kiel taskon bone administri la tuton kaj meti, kie necese, prioritatojn.

La praktika realigo devos esti pli detale priekzamenata.

Tiamaniere ĉio kadras kun la statutoj kaj certigas pli realisman agadon, ĉar tiel ĉiu membro estos persone kaj individue engaĝita en la tuto.

Komprenеble, kaj mi konsciiĝas pri tio, tiu ĉi propono sonas ege idealisme. Ĝi cetere estas realigebla nur kaj ekskluzive per la bona volo de ĉiuj. Tamen, iom da serioza kaj objektiva pripensado certe malkovros ĝian simplecon kaj ĝiajn eblecojn, kiuj fakte estas multe kaj multege pli grandaj ol mi povas nun ekspliki.

Ni nur ne tro har-fend-emu !

Jen plano por la estonto, rilate al kiu ni havas ankoraŭ iom da tempo. Mi eĉ kuraĝas proponi prokrasti ĝian veran prilaboradon ĝis post la kongreso.

Tamen restas grava problemo, tuj solvenda. Tiu de la financado.

Pri tio ankaŭ ni havas planon, sed mi proponas priparoli ĝin post kiam nova estraro estos elektita, por eviti eventualan duoblan laboron.

Mi esperas ke ĉiu bonvolos prikonsideri tiun ĉi proponon kaj doni sian personan impreson kaj intertempe elkore dankas pro via afabla atento.

JB

1.6.1. ID trovas, ke la hodiaŭa ĝenerala kunsido efikas negative. Li metas tion sur la konton de natura evoluo. Komence abundas entuziasmo. Oni planas pli ol oni fakte povas fari, poste konstatas ke ĉio ne efektiviĝas kiel planite, malkuraĝiĝas ktp. Konklude li proponas dum certa tempo bremsi la agadon kaj iom ripozi, eviti novajn elspezojn kaj dumtempe limigi sin al vivtenado de la akirajoj.

1.6.2. ID ankaŭ opinias, ke volante labori pli profesie, FEL kopias la agmanieron de profesiaj instancoj, dum fakte ni dependas de la libervolo. Ni ne tro okupiĝu pri strukturoj, sed pri personoj.

1.6.3. PP opinias ke la kunsido ne aspektas negativa, sed male ĝuste pozitiva. Neniam antaŭe la jarraporton enhavis tiom da pozitivaj elementoj. Eĉ nur



la kadrokursoj jam donas pozitivan aspekton.

2. KONKLUDO

La prezidanto, en sia konkludo, diras ke li tute ne ŝatas vortojn kiajn negativa/pozitiva. Ni klopodu esti honestaj kaj realismaj.
Ekzemple, la kerno de kadromembroj jam funkcias. La traduk- kaj eldon-komisiono jam funkcias...

Organizado kaj strukturo ne kontraŭstaras homajn rilatojn.

Strukturo estas nepre necesa por la ekvilibro.

3. Honorigo de meritplena aktivulo.

Malgraŭ la malbona financa situacio, la estraro ne volis preterlasi tiun ĉi punkton.

Por hodiaŭ elektiĝis Jules VERSTRAETEN, respondeculo pri la financoj.

Jen, kiel tekstis la honoriga paroladeto:

Kara Jules,

Ju pli mi konas vin, des pli vin ŝatas,
ĉar dank' al homoj kiel vi,
la "verda sango" plu pulsatas.
Antaŭe BEF kaj Flandran Ligon poste,
subtenis vi, ja eĉ propra koste !
Ja dank'al tio, ke vi ĉiam ege saĝe
al ni sekvendan vojon montris,
Ni nun daŭrigas ne sen-kuraĝe
laŭ la model' kiun vi por ni elsondis.
Unue pensas mi pri via bonhumoro,
pri via bon', pri via nobla koro.
Neniam spertis ni rifuzon, kontraŭstaron.
Neniam metis vi en nia voj' malhelpan baron.
Por vi ekzistis ĉiam nur "l'afero", la movado.
Rilat'al tio, vi restis la fidela kamarado.
Ĉu mirige, do, ke nun ni volas laŭdi
Homon, pri kiu nur malofte eblas ion aŭdi ?
Ĉar ja labori en silent' ne movas venton,
nek kreas bruon, nek gloriĝan tenton.
Se glorado estas nure efemera,
via laboro, Amiko Jules, estas daŭre vera.

Imagi nur, ke mankus nin la via fort',
ĝi kaŭzus tuj al ni timigan sort'n !
Ho ne, pri tio pensi ni nur ne faru,
por ke dubo pri l'estontec' ne sin deklaru !
Amiko Jules, mi longe volus laŭdi plu,
sed mankas min parola flu'.
Vortaro mia ne entenas
tion, kion mi diri penas.
Danki volus vin mi, gratuli,
prikanti vian afablan persistemon
per kiu vi sukcesis nin stimuli
al daŭra kaj kuraĝa laboremo.
Esperi ankaŭ volus mi
ke l'laboro via ne estu vana,
sed certigu nun al ciuj ni
sukceson en la ag' movada.
Bonvolu, kara, ĉies nome
akcepti nune memordone
konacon kiel dankesprimon
pri nia vera altestimo.
Inviti volus ĉiujn mi
aplaŭdi per laŭta kri'
Gratulojn Jules, hip' hip' hura !

13 03 1982 JB

---

II. ĜENERALA PARTO

1. Akcepto de la administrantaro - vidu la organigramon.

1.1. Alelektiĝas (kooptiĝas)
   - Fernand Roose
   - Roger De Schepper
   - Jan Bovendeerd

2. Elekto de novaj estraro kaj prezidanto
   Elektiĝas :
   - prezidanto : Edward Symoens
   - estraranoj : Jules Verstraeten, Roger De Schepper, Fernand Roose, Guido Schroeyers kaj Jan Bovendeerd.



3. La estraro instaliĝas per aplaŭdo, sekvata de alkonduka alparolo de la prezidanto.
   Jen ĝi :

Karaj Ge-FEL-anoj,

Por la dua fojo ni renkontiĝas en salono de ĉi tiu prestiĝa kastelo, senpage disponigita de la Ministerio pri Nederlanda Kulturo.
Mi dankas al vi ĉiuj, kiuj partoprenas nian jaran kunvenon.Ke ni ne estas pli multnombraj ne tro mirigas min. Ni konstatas la saman foreston en aliaj asocioj por ĝeneralaj kunvenoj. Mi do des pli aprezas vian ageman ĉeeston.

Ĝenerala jarkunveno ĉiam estas okazo pripensi la enhavon de la pasinta jaro sur iu tereno kaj el tiu fari konkludojn por la venonta. Pri la unua, nia sekretario jam raportis. Vi juĝos mem ĉu la rezultoj estas pozitivaj aŭ negativaj, sufiĉaj aŭ nesufiĉaj.

Pasintan jaron, ĉi tie, en mia alparolo, mi demandis ĉu vere en nia agado ni sufiĉe sekvas la rapidegan mensan kaj teknikan evoluon de la socio en kiu ni laboras, ĉu niaj labormetodoj estas sufiĉe ĝisdataj kaj psikologie pravaj. Tia demando ne estas tre originala, sed ĝi certe estas aktuala, ĉar ankaŭ UEA iniciatis du gravajn seminariojn pri informado kaj planado en la moderna socio : unu en Rotterdam (oktobro), dua en Bad Saarov - DDR - (novembro), tria okazos en majo en Rotterdam.
Bedaŭrinde pro tempomanko en la Centra Oficejo, la diskonigo kaj disvastigo de la rezultoj kaj konkludoj ege malfruiĝis.
Pli ol iam mi estas konvinkita ke nur per samtempa, amasa kaj translima agado (vi ja konas mian sloganon!) unuflanke, kaj modernigitaj kaj adaptitaj iloj, metodoj kaj strategioj ni povas antaŭenigi nian movadon iom pli rapide.
Ni nun atendas reagon de la landaj asocioj, al kiuj la Centra Oficejo sendis alvokon agi en instrumedioj laŭ la rekomendoj de la Roterdama seminario, bazitaj sur tiuj kiujn mi prezentis al FEL kaj APE antaŭ tri jaroj.
Se oni ne reagas, FEL preparos sin por agi sur sia propra tereno, en kunlaboro, mi esperas, kun APE (Asocio Por Esperanto) kaj eble unu aŭ du aliaj Landaj Asocioj. Mi konsentas okupiĝi pri tiu afero, sed mi vere aktive povos komenci la laboron post la Antverpena Kongreso, kiu momente forrabas ĉiujn miajn fortojn kaj tempon.

Embrie pluraj gravaj projektoj ekzistas kaj eĉ timeme komenciĝas realiĝi en funkcio de iu larĝskala kampanjo :
- la kadrokursoj (ni ja bezonas bone informitajn homojn je ĉiu nivelo)
- la traduk- kaj verkiga servo sub la gvidado de Kris Declerck (ni bezonos

multajn novajn tekstojn, tradukitajn kaj originalajn, librojn kaj eseojn)

- la verkado de taŭgaj iloj. Rilate al tio, mi povas anonci ke mia eseo pri la soci-politika, pedagodia kaj kultura valoro de Esperanto aperos ĉu en La Chaud-de-Fonds, ĉu en UEA-serio kaj ke Rik de Roover preskaŭ finas ties nederlandlingvan tradukon.
- Sekve al mia alvoko trovi iun, kiu konsentas kolekti informojn pri ĉiuj jam aperintaj universitataj tezoj rilate Esperanton, mi jus ricevis proponon de prof. Wenclewsk el Lubumbashi por fari tiun laboron.

Alia prepara laboro mia konsistas el aktiva partopreno en internaciaj kolokvoj por diskonigi nian problemaron en internaciaj universitataj medioj. La 2-an de junio, mi prezentos referaton en la kadro de la Instituto pri plurlingveco en Bruselo dum internacia kolokvo pri 'lingva kontakto kaj lingva konflikto : kelkaj teoriaj konsideroj rilate Esperanton." Mi ellaboris sufiĉe originalan hipotezon, kiu estis akceptita de la organizantoj.

En novembro ĉi-jare, mi partoprenos alian internacian kolokvon en Gento pri lingvo-instruado kaj prezentos referaton pri la laboro farita en Paderborn kaj Budapeŝto rilate al la lingvoorientiga signifo de Esperanto.
Kaj fine, mi daŭre klopodas aperigi plurnacilingvan verkon pri la Internacia Lingvo en prestiĝa serio de AIMAV en Gento. La principa konsento jaŭ ekzistas, sed restas kelkaj praktikaj problemoj solvendaj. Prof. Duc Goninaz el Aix-en-Provence jam alskribis tiurilate 18 internaciajn filologojn kaj lingvistojn el la tuta mondo; kelkaj jam favore respondis kaj eĉ sendis tekston.

Sed ĉio tio ne povas igi nin forgesi, ke la baza laboro en la grupoj estas kaj restos esenca kondiĉo de sukceso en aliaj medioj. La ĉiutaga loka kaj regiona agado, la organizo de lokaj kursoj, la informado de lokaj kaj regionaj gazetoj la rilatoj kun la lokaj aŭtoritatoj kaj kulturaj, sindikataj kaj politikaj instancoj, la interna informado kaj formado de la grupanoj ktp konstituas la vivesencon de nia movado, la fundamenton de nia piramida konstruaĵo.

Kaj por fari tiun laboron, oni ne bezonas instrukciojn flanke de la estraro, oni nur bezonas konvinkon, dediĉon, laboremon, paciencon, fantazion.

Pluraj el niaj grupoj iom griziĝas kaj bezonas novan sangon. Pro tio, ni nepre devas multe pli aktive kaj organize kunlabori kun la tre agemaj junuloj kiuj enestas nian movadon.

Ni regule bezonas novajn impulsojn por agi, individue kaj grupe. Ĉu la UK povas doni tiujn impulsojn ? Centoj kaj centoj kaj nerekte miloj da homoj estas regule informitaj aŭ almenaŭ aŭdas ion pri Esperanto.
Tio estas la venontjara tasko : eluzi ĝisfunde tiun prestiĝan eventon por antaŭenigi nian movadon, kun aliaj se eble, solaj se necese ! Dankon !



4. Ĝeneralaj decidoj.

4.1. Solvo al niaj financaj problemoj.

4.1.1. Por pli da klareco, jen mallonga raporto pri ekstra-estrarkunsido de vendredo 19 02 1982 en la Esperanto-domo al kiu partoprenis J. Verstraeten, R. De Schepper, P. Peeraerts kaj J. Bovendeerd.

4.1.2. Cele al pli-certigo de niaj enspezoj kaj konstatinte, ke diversaj membroj kiuj promesis ekz. ĝirigi monate iun sumon, kiel petite antaŭe (ELDON-KONTO) ne plenumis sian promeson, ni pripensis iasence "helpi" al ili, farante por ili la necesajn paŝojn. Tial JB informiĝis ĉe iu financ-entrepeno pri la eblecoj je "fakturado" kadre de "domicilado" laŭ la ekzemploj de la telefon-, gas- kaj elektro-kompanioj.
Tio jes eblas kadre de nov-kreita "DOM-80" (domicilado 80), kiu ebligas al societoj, asocioj ktp forpreni de sia klientaro/membraro la zorgon pri regule reventantaj pagoj.

La propono, kvankam alloga unuavide, renkontas diversajn kontraŭstarojn. Decidiĝas; ke PP informiĝu pli detale ĉe Kredietbank.

4.1.3. PP eksplikas, ke la sistemo de fakturado/domicilado havas grandegajn avantaĝojn tiel por FEL mem, kiel por la gemembroj. El administra vidpunkto ĝi permesas fari seriozajn ŝparojn en laborhoroj, ĉar ja la banko faras la laboron por ni, post la unua - kaj nura - enmeto en la librotenado.

4.1.4. La membroj tiel estos liberigitaj de la ĉiam reventantaj kalkukado kaj pagado.

4.1.5. Kompreneble, tiu ĉi sistemo estas ebla nur, kondiĉe ke la membroj donu sian konsenton.

4.1.6. El teknika vidpunkto, ĉiu interesito sciigu al ni (la Centro) tion, kion li/ŝi efektive deziras, pere de speciala dokumento kaj donu sian konsenton pri fakturado.

4.1.7. Ekzameninda laŭ JB estas la ebleco je dispartigita pago monata/trimonata/duonjara.

4.1.8. La teknikaĵoj estu priekzamenotaj.

4.1.9. Ĉu la ĝenerala kunsido akceptas la principon ?

Jes.

4.1.10. Kompreneble, por ebligi la novan sistemon, la ĝenerala kunsido ankaŭ decidu pri la nova kotiz-sistemo kiu fakte estis provizora por unu jaro.

4.1.11. Decidiĝas plilongigi ĝin por unu jaro.

4.1.12. Proponiĝas diskonigi la sistemon pere de ESPERANTO PANORAMA kun tre detala klariga teksto.

4.1.13. Grava punkto : personoj kiuj konsentas donaci al FEL sumon de BF 1.000,- ricevos senpage ekzempleron de de infanromaneto (por plenkreskuloj) de Rik de Roover "LA AVENTUROJ DE ŜPAR- KAJ ALIA PORKO" subskribitan de la aŭtoro.

4.2. INFORMILO.

4.2.1. Ĉu pro financaj kialoj ni reduktu INFORMILO-n al nura kadrogazeto, t.e. al nuraj protokoloj kaj urĝaj sciigoj ?

4.2.1.1. ID opinias, ke INFORMILO estas alloga, kiam oni konas la verkinton, sed ĉu jam ne estas pli ol sufiĉe da revuoj ? Ĉu INFORMILO ne estas simple malhavebla ?

4.2.1.2. JB atentigas pri tio, ke INFORMILO kreiĝis fakte pro ŝparemo, por povi dissendi la protokolojn en formo de revuo, do por 1/6 de la normala afranko por presaĵoj.

4.2.1.3. La ideo pri revuo venis nur poste kaj havis kiel celon dissendi ĝin al ĉiu membro de FEL, por tiel meti la necesajn kontaktojn.

4.2.1.4. INFORMILO ankaŭ povus kunigi en si diversajn lokajn bultenojn, konsiderante ke ĉiu revuo enhavas parton da nura paper-plenigado.

4.2.1.5. Redaktoroj de lokaj gazetoj ne konsentas, ĉar iliaj temoj koncernas nur la lokajn membrojn, ĉar loka gazeto permesas dissendi la komunikojn je la ĝusta, dezirata momento ktp.

4.2.1.6. Estas por- kaj kontraŭoj.
La prezidanto proponas, ke la diversaj redaktoroj foje kunmetos la kapojn por priekzameni ĉiujn problemojn kaj trovi solvon al la situacio.

4.2.1.7. La ĉeesantaj redaktoroj (Fern. Roose, H. Deceuninck kaj Marc Van den Bempt ) konsentas.
La aliaj (i.a. Wim Tytgat, Demulder, M. De Wit) estas ĝustatempe invitataj.

4.2.1.8. Intertempe decidiĝas redukti INFORMILO-n al nura kadro-gazeto.

4.3. ĜENERALA JARRAPORTO

4.3.1. S-ro Maertens proponis eldoni la jarraporton bele presite kajerforme kaj dissendi ĝin al ĉiuj niaj membroj samkiel, kiel eble plej larĝskale al oficialaj instancoj ktp.
Tamen, niaj financaj rimedoj ne permesas ion tian nun.

4.3.2. Decidiĝas agi kiel difinite en la protokolo pri la estrarkunsido de 13 02 1982, nome disponigi nian kutiman jarraporton por nia subvencidosiero destinita al la ministerio al ĉiu interesito.



4.4. Laborplano.
La prezidanto proponas prikonsideri la proponojn de la sekretario en la jarraporto (labori per sektoroj) kaj plu pritrakti ĝin okaze de venonta administrantara kunsido (prefere post la UK)
Rilate al la financoj, li proponas bonvole prikonsideri la proponojn de la financa komisiono (= altiri kiel eble plej multe da novaj membroj simpatiantoj kaj apliki la novan financ-sistemon.)

5. DIVERSAĴOJ

5.1.1. S-ro W. Desmet miras pri la fakto, ke li nenie vidis ion pri la Semajno de Internacia Amikeco.

5.1.2. JB agnoskas, sed atentigas pri tio, ke li nenion ricevis tiurilate. Ĉi jare li mem ne povis ĉeesti, tiel ke li komplete dependis de la novaĵoj ricevotaj.

Por fini, la prezidanto dankas al ĉiu pro la kunlaboro kaj fermas la kunsidon je 16.50 h.

----------------

Aldone vi trovos du formularojn, respektive IDENTIGILO-n kaj ANTAŬMENDO-n de la broŝuro "ESPERANTO, KION MI POVAS FARI PER TIO ?".

Bonvole nepre resendu la unuan; la duan laŭ intereso.

La unua helpos al ni fari la unuan paŝon al kunmetado de "sektoroj laŭ intereso", kiel priskribita en la jarraporto. Enmetu bv. ankaŭ viajn ŝatokupojn kaj jes/aŭ ne kulturajn interesiĝojn. Dankon !

A T E N T U !

Pro la fakto, ke tro malmulte da personoj sin anoncis por kunlabori en la organizado de la venonta Universala Kongreso, la estraro de FEL sentis kiel sian devon eniri la LKK-n.
Tio signifas, ke ni bedaŭrinde devas redukti nian FEL-agadon al plej urĝaj kaj necesaj taskoj.

Bonvolu do ne koleri se, ĝis post la UK, vi ne plu aŭdos de ni.

Anticipan dankon.

# FLANDRA ESPERANTO-LIGO. ORGANIGRAMO

ekde 01.11.1981 : Frankrijklei 140, ANTWERPEN 031/ 34 34 00

- Postĝirkonto 000-0265338-43 - Bankkonto 402-5510531-55
IVA (BTW) 419.028.122

## HONORA KOMITATO

| | | | |
|---|---|---|---|
| Emiel CORTVRIENDT<br>Diepestraat 29<br>2000 ANTWERPEN<br>031/32 44 30 | Frans COUWENBERG<br>Koninginnelaan 14<br>8370 BLANKENBERGE<br>050/41 25 75 | Gerard DEBROUWERE<br>Magdalenastraat 29<br>8500 KORTRIJK<br>056/22 16 54 | Cesar VANBIERVLIET<br>Oudenaardsesteenweg 158<br>8500 KORTRIJK<br>056/22 00 11 |

## ESTRARO

| prezidanto | vic-prezidanto | sekretario | kasisto | membroj |
|---|---|---|---|---|
| Edward SYMOENS<br>Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT<br>031/66 62 66 | Roger DE SCHEPPER<br>Doornstraat 22<br>2610 WILRIJK<br>031/27 24 05 | Jan BOVENDEERD<br>Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL<br>(pr.) 031/49 50 06<br>(of.) 02/513 80 90/249 | Jules VERSTRAETEN<br>St. Bernardsesteenweg 1078<br>2710 HOBOKEN<br>031/27 66 43 | Fernand ROOSE<br>St. Klaradreef 59<br>8000 BRUGGE<br>050/33 19 81 |
| | | | | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113<br>3538 HELCHTEREN<br>011/53 64 10 |
| | | | | Kristin TYTGAT<br>St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL<br>031/49 50 24 |

## ADMINISTRANTARO REPREZENTANTARO

## UEA-KOMITATANOJ

| | | |
|---|---|---|
| Gregoire MAERTENS<br>Prins Leopoldstraat 51<br>8310 BRUGGE<br>050/35 49 35 | Edward SYMOENS<br>Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT<br>031/ 66 62 66 | Wim DE SMET<br>Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT<br>031/ 66 99 49 |

| GRUPOJ korespond-adresoj | prezidanto | sekretario | kasisto | administranto(j) | reprezentanto |
|---|---|---|---|---|---|
| **Antverpeno** | | | | | |
| Antwerpen<br>LA VERDA STELO<br>Frankrijklei 140<br>2000 ANTWERPEN | Ivo DURWAEL<br>Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM<br>031/40 30 92 | Paul PEERAERTS<br>Kloosterstraat 35<br>2000 ANTWERPEN | Henri BOLJAU<br>Pastorij straat 45<br>2000 ANTWERPEN<br>031/35 93 45<br>000-0072654-01 | Ivo DURWAEL<br>Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | |
| | | | | Yvonne GREGOIR<br>Fr. Craeybeckxl.4/13<br>2100 DEURNE<br>031/24 20 58 | |
| | | | | Jules VERSTRAETEN<br>St. Berna rdsestwg 1078<br>2710 HOBOKEN<br>031/27 66 43 | |
| | | | | Cecile LEUNTJES<br>Eksterlaar 74<br>2100 DEURNE<br>031/21 28 53 | |

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ESPERANTO DEURNE<br>Eksterlaar 74<br>2100 DEURNE | Frans LUYTEN<br>Boekenberglei 256<br>2100 DEURNE<br>031/21 02 54 | Cecile LEUNTJES-WILLEMS<br>Eksterlaar 74<br>2100 DEURNE<br>031/21 28 53 | Jo PEETERS<br>Eksterlaar 13<br>2100 DEURNE<br>031/21 12 53 | Frans LUYTEN | |
| ESPERANTO EDEGEM<br>Mgr. Cardijnlaan 9<br>2520 EDEGEM | Gaston WIJCKMANS<br>Mgr. Cardijnlaan 9<br>2520 EDEGEM | S-ino WIJCKMANS-WILBERTS | Rosette VAN HERCK<br>Van Raemdonckl.88<br>2520 EDEGEM | Rosette VAN HERCK | |
| LA ERIKEJO<br>Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT | Wim DE SMET<br>Hertendreef 33<br>2180 KALMTHOUT<br>031/66 99 49 | Pansy HUYBRECHTS<br>Rozendreef 33<br>2180 KALMTHOUT<br>031/66 99 88 | Erhard BOEHME<br>Plantinlaan 10<br>2090 STABROEK<br>031/64 40 47 | Erhard BOEHME | |
| ESPERANTO MECHELEN<br>Lange Zandstraat 38<br>2580 St.KAT. WAVER | Roger SAELS<br>Lange Zandstraat 38<br>2580 S, K, WAVER<br>015/31 17 90 | Roger SAELS | Roger SAELS | Roger SAELS | |
| ESPERANTO MORTSEL<br>Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | Paula TYTGAT<br>St. Hathebrandstr.8<br>2510 MORTSEL<br>031/49 50 24 | Jan BOVENDEERD<br>Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL<br>031/49 50 06 | Paula TYTGAT<br>220-0281854-08 | Kristin TYTGAT<br>St. Hathebrandstr 8<br>2510 MORTSEL<br>031/49 50 24 | |
| 2120 SHOTEN | | | | | Edward SPITAELS<br>Tijllaan 11<br>2120 SCHOTEN<br>031/58 74 20 |
| ESPERANTO TURNHOUT<br>Harmoniestraat 47<br>2300 TURNHOUT | Gorik DUYCK<br>Harmoniestraat 47<br>2300 TURNH[illegible] | Jan SYMOENS<br>Lorkenlaan 2<br>2350 VOSSELAER<br>014/61 17 74 | Nic ENGELEN<br>Rodenbachlaan 74<br>2300 TURNHOUT | Jan SYMOENS | |
| ESPERANTO WILRIJK<br>Doornstraat 22<br>2610 WILRIJK | Monique VEREECKEN<br>Doornstraat 22<br>2610 WILRIJK<br>031/2[illegible]4 05 | Ria VAN MEULDER<br>Volkerenlaan 10<br>2610 WILRIJK | Linda DE SCHEPPER<br>Doornstraat 22<br>2610 WILRIJK<br>031/27 24 05 | Linda DE SCHEPPER | |

## Brabanto

Provinca kontaktpersono : M.T. HENQUINEZ
Lipsestraat 166
2991 TILDONK

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ESPERANTO BRUSELO | Emiel VAN DAMME<br>Albert I straat 44<br>1750 SCHEPDAAL<br>02/569 17 83 | S-ino BOUVY<br>Steenboklaan 129<br>1200 BRUSSEL<br>02/771 27 32 | E. LADURON<br>Sperwerlaan 86/5<br>1150 BRUSSEL<br>961-0907453-13<br>000-0123048-52 | Emiel VAN DAMME | |
| 1510 HALLE BUIZINGEN | | | | | Herman DECEUNINCK<br>Floralaan 21<br>1510 HALLE BUIZINGE<br>02/356 86 86 |
| ESPERANTO 2000<br>Duisburgstraat 12<br>3030 HEVERLEE | J.P. FERTINEL<br>Diestersteenweg 18<br>3970 LEOPOLDSBURG | Marc VAN DEN BEMPT<br>Duisburgstraat 12<br>3030 HEVERLEE<br>016/20 14 53 | Herman VAN EYNDT<br>Hofeinde 43<br>2280 GROBBENDONK<br>734-3331944-03 | M.Th. HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166<br>2991 TULDONK | |
| 1750 SCHEPDAAL | | | | | Emiel VAN DAMME<br>Albert I str. 44<br>1750 SCHEPDAAL<br>02/569 17 83 |

# Limburgo

Guido SCHROEYERS
Helzoldstraat 113
3538 HELCHTEREN 011/53 64 10

ESPERANTO LIMBURG
Justus Lipsiusstraat 26
3500 HASSELT 011/22 74 23
459-1060671-37

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ESPERANTO BERINGEN<br>Paalsesteenweg 10<br>3950 BERINGEN | Jos LEMMENS<br>Maasheide 7<br>3950 BERINGEN<br>011/42 26 36 | Alfons BECKERS<br>Paalsesteenweg 10<br>3950 BERINGEN<br>011/43 66 22 | Alfons BECKERS | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113<br>3538 HELCHTEREN<br>011/53 64 10 | |
| ESPERANTO HASSELT<br>Kuringersteenweg 294<br>3500 HASSELT | Jozef CHRISTIAENS<br>Justus Lipsiusstr.26<br>3500 HASSELT<br>011/22 74 23 | Guido COOREMANS<br>Kuringersteenw.294<br>3500 HASSELT<br>011/25 16 12 | Guido COOREMANS | Jozef CHRISTIAENS | |
| 3538 HELCHTEREN | | | | | G. SCHROEYERS<br>Helzoldstr. 113<br>3538 HELCHTEREN<br>011/53 64 10 |
| ESPERANTO TESSENDERLO<br>Kerkstraat 13<br>3980 TESSENDERLO | Willy GODELEYNE<br>Kerkstraat 13<br>3980 TESSENDERLO | S-ino GODELEYNE | S-ino GODELEYNE | P-ro A. BECKERS<br>Rozenlaan 5<br>3950 BERINGEN<br>011/42 10 78 | |

# Okcident-Flandrujo

Kontaktpersono : Fernand ROOSE
St. Klaradreef 59
8000 BRUGGE 050/33 19 81

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 8580 AVELGEM | | | | | Julien ALGOET<br>Leynseelstr. 43<br>8580 AVELGEM |
| E-O BLANKENBERGE<br>Helmweg 7<br>8300 KNOKKE/HEIST I | Frans COUWENB<br>Koninginnelaan 14<br>8370 BLANKENBERGE<br>050/41 25 75 | Albert MARMENOUT<br>Helmweg 7<br>8300 KNOKKE/HEIST I<br>050/60 55 35 | Albert MARMENOUT<br>000-0436398-92 | Albert MARMENOUT | |
| BRUĜA JUNALARO<br>Sikkelstraat 61<br>8000 BRUGGE | Oliva VAN EE<br>Sikkesltraat<br>8000 BRUGGE | Dirk MAERTENS<br>Hogeweg 20<br>8200 BRUGGE 2 | 000-1022535-58 | Oliva VANBOUWEL-<br>VAN EEGHEM<br>Sikkelstraat 61<br>8000 BRUGGE | |
| PACO KAJ JUSTECO<br>St. Klaradreef 59<br>8000 BRUGGE | Fernand ROOSE<br>St. Klaradreef 59<br>8000 BRUGGE<br>050/33 19 81 | Roger ISERENTANT<br>St.Pieterskerkstr. 61<br>8000 BRUGGE<br>050/31 50 64 | M.L. SEYNAVE<br>Altebijstraat 84<br>8310 BRUGGE<br>050/82 29 50<br>280-0206885-21 | Roger ISERENTANT | |
| BRUĜA REĜA SOCIETO<br>Filips de Goedel.18/11<br>8000 BRUGGE | Charles POUPEYE<br>F. de Goedel.18/11<br>8000 BRUGGE<br>050/31 83 58 | Isabella VAN PARYS<br>Gistelsestwg. 338<br>8200 BRUGGE St.Andries<br>050/31 69 26 | F-ino M. WILLEMS<br>Veldm. Fochstr. 55<br>8000 BRUGGE<br>050/33 42 89<br>000-0483533-85 | Charles POUPEYE | |
| | | | | Isabella VAN PARYS | |
| LA KONKORDO<br>Oudenaardsesteenweg 158<br>8500 KORTRIJK | Gerard DEBROUWERE<br>Magdalenastraat 29<br>8500 KORTRIJK<br>056/22 16 54 | Jan HANSSENS<br>Meiweg 23<br>8500 KORTRIJK<br>056/21 31 06 | C. VANBIERVLIET<br>Oudenaardsesteenweg 158<br>8500 KORTRIJK<br>056/22 00 11<br>000-1144142-27 | Cesar VANBIERVLIET<br>Jan HANSSENS | |
| 8810 RUMBEKE | | | | | Paul VERHALLE<br>Meensestwg 409<br>8810 RUMBEKE<br>051/20 43 52 |
| 8178 WOUMEN | | | | | André GYSEL<br>Woumenweg 162<br>8178 WOUMEN<br>051/50 13 95 |
| OOSTENDE | | | | | A. D'HULSTER<br>Paul Michielslaan 10<br>8400 OOSTENDE |

# Orient-Flandrujo

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| ESPERANTO AALST<br>Raffelgemstr. 16/38<br>9300 AALST | Robert DEBONDT<br>V.de Saedeleerstr 30<br>9300 AALST<br>053/70 25 13 | Myriam WATERINCKX<br>Raffelgemstr. 16/38<br>9300 AALST<br>053/77 33 79 | Maurice DENIT<br>Ninovestraat 157<br>9440 EREMBODEGEM<br>053/70 53 68<br>068-0679940-94 | Myriam WATERINCKX | |
| EREMBODEGEM | | | | | Erik D'HONDT<br>Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM<br>053/77 44 97 |
| GENTA KLUBO<br>Belgradostraat 43<br>9000 GENT | Adh.VAN DE VELDE<br>Belgradostraat 43<br>9000 GENT<br>091/23 56 40 | Adh. VAN DE VELDE | A. VAN DE VELDE<br>440-0680421-38 | A. VAN DE VELDE | |
| LA PROGRESO<br>Buffelstraat 1<br>9000 GENT | Yvonne VELGHE<br>Brusselsestwg 385<br>9219 GENTBRUGGE<br>091/30 13 01 | | Adolf DE MULDER<br>Nekkersputstr.106<br>9000 GENT<br>091/26 17 93<br>000-1098268-34 | A. Lödör<br>Brusselsestwg 385<br>9219 GENTBRUGGE<br>091/30 13 01 | |
| 9550 HERZELE | | | | | Robert DAEM<br>Kruisveldstr.9/2<br>9550 HERZELE<br>053/62 64 96 |
| 9400 NINOVE | | | | | R. STEENHOUDT<br>Pamelstraat 296<br>9400 NINOVE<br>054/33 59 71 |
| 9700 OUDENAARDE | | | | | Stephaan d'HAEYER<br>Rekkemstraat 4<br>9700 OUDENAARDE<br>055/31 35 61 |
| E-o St. NIKLAAS<br>G. Gezellelaan 49<br>2700 St. NIKLAAS | Luc POTIAU<br>Parkstraa[illegible]/6<br>2700 St. NIKLAAS<br>031/76 30 10 | Gerard BAEYENS<br>Molendreef 81<br>9180 BELSELE<br>031/72 57 42 | René LUTZ<br>Fabiolapark 789<br>2700 St. Niklaas<br>031/76 54 21<br>001-0971235-50 | Leo CORIJNEN<br>Weynstraat 1<br>2700 St. NIKLAAS<br>031/76 33 88 | |
| Fleja | Kristin TYTGAT<br>St.Hathebrandstr.8<br>2510 MORTSEL<br>031/49 50 24 | J.P.VANDENDAELE<br>Herdenkingslaan 97<br>9000 GENT | Luc POTIAU<br>Warmenouwstr.<br>BELSELE<br>393-0054417-89 | Gerd JACQUES<br>p/a ESPERANTO-CENTRO | Wim TYTGAT<br>St. Hathebrandstr.8<br>2510 MORTSEL<br>031/49 50 24 |

ALIĜINTAJ FAK-ASOCIOJ

B.E.F.A. (BELGA ESPERANTISTA FERVOJISTA ASOCIO
p/a Lucien DE SUTTER
Pijnbomenweg 4
1180 BRUSSEL 02/358 15 73

F.A.B.E. (FLANDRA ASOCIO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ)
p/a Emmanuel VANDEKERHOVE
Pakenstraat 57
3030 LEUVEN/HEVERLEE 016/23 18 50 (de 19 ĝis 21 h.)

I.K.U.E. (INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA)
p/a Hubert AUDENAERT
Beekstraat 6
9100 LOKEREN 091/48 44 56

LABORISTA ESPERANTO-GRUPO "ANTAŬEN"
Ruggeveldlaan 635 b.2
2100 DEURNE

I.L.E.I.(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj
p/a Marc DEMONTY
Missionarisselaan 39/5
1080 BRUSSEL 02/520 19 44

RICEVANTOJ DE NIAJ PROTOKOLOJ KAJ INFORMOJ

Marc DEMONTY (presidanto de BEF)
Missionarissenlaan 39/5
1080 BRUSSEL

A. Mertens-Goossens (sekr. BEF)
Achter d'Abdij 46
1720 DILBEEK

F-ino L. DREZE (prez. de APE)
rue Louvrex 105
4000 LIEGE

F-ino A. ORSOLINI (ĉefdelegito de UEA)
rue Paul Pastur 6
6000 CHARLEROI

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Nieuwe Binneweg 176
NL-3015 BJ ROTTERDAM

ESPERANTO-CENTRO NEDERLAND
Riouwstraat 172
NL-2585 HW DEN HAAG

Eliza KEHLET ( UEA- Kongresoj)
Heideweg 20
2120 SCHOTEN

D-ino Flora SZABÓ FELSŐ (UEA-sekr.)
Zója u. 5/b VII 22
H-7624 PECS, Hungario

S-ino Ursula GRATTAPAGLIA (UEA-inf.)
Caixo Postal 04-0097
BR-70000 BRASILIA, Brazilo)

S-ro Renato CORSETTI (UEA-landa agado)
Via della Cave, 82/C
I-00181 ROMA, Italio

Eŭropa Esperanto-Centro
Montoyerstrato 37 b. 24
1040 BRUSELO

S-ro Humphrey TONKIN (UEA-Ekst.rilatoj)
Stouffer College House
3700 SPRUCE St.
PHILADELPHIA, PA 19104 USA

HEROLDO DE ESPERANTO
Calle Juan Ramón Jimenez 28 6° A
MADRID 16, Hispanio

Baldur RAGNARSSON
Sogavegur 170
IS-108 REYKJAVIK, Islando

# F L E J A

15 APR. 1982

PROTOKOLO PRI LA ĜENERALA JARKUNSIDO DE DIMANĈO 7-A DE MARTO 1982 EN ANTVERPENO

Ĉeestis : Gerd kaj Ilse JACQUES, Jean Pierre VandenDaele, Ite kaj Wim TYTGAT, Bob VENHUIZEN, Herman VAN EYNDT, Myriam RUYSSINCK, Anne TILMONT kaj Oliva VAN EEGHEM (matene).

Neĉeestis : Kristin TYGAT (en Italio), Geert DEHOUX (pro dejoro), Herman DECEUNINCK (pro "granda distanco"), Luc POTIAU (en USONO) Danny VAN DAELE (pro militservo) Herman MORTELMANS (senkulpiĝinta)

T A O G O R D O

1. La protokolo estas unuanime aprobita.

2. INTERNA REGULARO :

   La propono de la interna regularo estas unuanime akceptita kun nur etaj ŝanĝoj. Ĝi estos nun uzata dum ĉiuj kunsidoj. Aldone vi trovos la definitivan tekston.

3. JARRAPORTO 1981

   Krom ŝanĝetoj kaj adonaĵoj la ĝenerala raporto estas akceptita. La financa raporto ne estis komplete finpreparita kaj ankaŭ ne kontrolita far la revizoroj. La estraro transprenas ĝin. La financa raporto plej baldaŭe estos kompilita kun bilanco kaj kontrolita de la revizoroj kaj aprobita dum la estrarkunsido. La anoj ricevos ĝin kune kun la protokoloj. Ĉiu akceptas krom unu kontraŭanto.

4. ELEKTADOJ (prezidas Paul PEERAERTS)

   Post la eksigo de la antaŭa administrantaro elektiĝas nova.

4.1. Administrantoj : la kandidatoj elektiĝis jene :
   Kiki kaj Ite TYTGAT, Jan ERREYGERS, Herman VAN EYNDT kaj Bob VENHUIZEN : unuanime.
   Wim TYTGAT, Gerd JACQUES kaj Jean Pierre VANDENDAELE : 1 sindeteno
   Ilse JACQUES : 1 kontraŭa.

4.2. Estraro : ne kandidatiĝis Bob kaj Herman VE. La aliaj kandidatoj jes.
   La nova sepopa estraro estis are akceptita per skriba voĉdonado.

4.3. Elekto de nova prezidanto : neniu estis kandidato. Kiki skribe avertis, ke ŝi nur nepre akceptos la prezidantecon. La voĉdonado okazis jene :
   - Kiki TYTGAT : 6 por, 1 sindeteno
   - Jan ERREYGERS : 3 por, 4 sindetenoj
   - Ite kaj Wim TYTGAT, Ilse JACQUES kaj Jean Pierre VandenDaele : 7 sindetenoj
   - Gerd JACQUES : 6 sindetenoj, 1 kontraŭo

4.4. Elektado de TEJO-komitatanoj 1983 : Gerd Jacques kaj Wim Tytgat kandidatiĝas. Amabù estas akceptitaj (ambaŭ 6 por kaj 1 sindeteno)

4.5. Elektado de revizoroj : proponiĝis 3 kandidatoj (Chris, Myriam kaj Wim). La du unuaj estas akceptitaj (ambaŭ 6 por, 1 sindeteno) kaj Wim (2 por, 5 sindetenoj) do ne estas elektita.

PAŬZO

5. ONTA AGADO.

5.1. Kongresoj :

5.1.1. HOEVEN (Nederlando) - klarigas Gerd Jacques)
Dato : 9 - 12 04 1982
Temo : Kreeco.
Tie okazos LKK-kunsido de la IJK.
Ĉar la ministerio petas vagonarbiletojn por la pago de vojaĝ-subvencioj, estos necese ke multe da partoprenontoj iru trajne kaj konservu siajn biletojn, kiuj estos repagitaj de FLEJA.
Se NEJ ne prizorgos librostandon, FLEJA faros.

5.1.2. IJK (informas Herman Van Eyndt)
Datoj : 31 07 - 07 08 1982
Temo : scienco kaj socio.
Antaŭvidita partoprenontaro : 300 - 350.
Alvenos biciklaj karavanoj el Hispanio kaj Jugoslavio.
Jam establiĝis laborgrupoj je scienca fako pri komputero, sed je socia fako (ekz. humana) ankoraŭ ne sin anoncis personoj.
Por la ekskurso necesas deko da personoj por montri la vojon al la aŭtobus-ŝoforoj kaj por gvidi la vojaĝontojn. La informan tekston prizorgos LKK. Vizitotaj estas la muzeo de Tervuren, la leono de Waterloo, la abatejo de Villersville kaj la universitataj loĝejoj de Louvain-la-Neuve.
Dum la nacia verspero okazus Flandra Kermeso. BLOSO povus disponigi materialon de popolludoj.
Interŝanĝoj kun Hungaroj. La kotizoj por 5 Hungaroj estos pagitaj de FLEJA-anoj kiuj volas iri al Hungario venontjare. FLEJA mem antaŭpagos tiujn ĉi sumojn.
Dum la IJK-kongreso estos bezonataj personoj por fari taskojn. Volontuloj sin anoncu ĉe LKK aŭ ĉe Esperantocentro.

5.1.3. UK (24 - 31 07 1982)
Junulartago : ĵaŭdon la 29-an de julio).
Matene : TEJO prezentas sin al la publiko.
Posttagmeze : serĉrondirado tra Antverpeno. Myriam faros la necesajn preparojn.
Vespere : manĝado, mempagota de la partoprenantoj, en junularklubejo (verŝajne Aalmoezenier) kun unuhora prezentado de popolgrupo. Anne serĉos kontaktojn kun tiaj grupoj.
Poste : dancvespero. Preparos tion Ilse kaj Chris (trinkejo)

5.1.4. Laborsabatoj en Den Haag (Nederlando)
Ĉiumonate, la lastan sabaton, FLEJA-NEJ okazigas laborsabaton laŭ konkretaj punktoj, kiel nun ekzemple : allogado de junulaj esperantistoj al junulargastejoj kaj inverse; okaze de la antaŭjara 50-jara ekzistado de junulargastejoj.
La celo estas ke tiuj projektoj estas tuj ellaboritaj.

5.1.5. Lichtaart.
Tiu ĉi kunveno daŭros unu tagon pli. Laboremuloj estas ĝis nun Chris, Ilse, Anne kaj Kiki (?). Aliuloj bonvolu sin anonci ĉe Esperantocentro.
La tendenco de la temo estos ; la saneco. Prikonsiderataj estos laborgrupoj pri "EHBO" (unua helpo ĉe akcidentoj) - kurso, alternativaj kuracmetodoj (ekz. homeopatio), dietiko, sanecpolitiko, diskuto de la du laborgrupoj pri konservativa kaj alternativa kuraceco.
Ankaŭ estos programo por pli junaj esperantistoj.

5.1.6. Lingvoborso en Bruselo - Heizel.
Interesitoj bonvolu kontakti Marc Demonty. FLEJA ne partoprenos ĝin pro samtempa FEL-jarkunveno.

5.2. REVUOJ.

5.2.1. JEN
Ĝi povas esti kompilita dum la laborsabatoj. Anne kandidatiĝas jam. Henk Diender havas tro da laboro (sekretario de NEJ, redaktado de JEN, studado) por sole fari la necesan laboron.
La prezorabato de JEN aldonita al "Cultureel Jongerenpaspoort" estos priparolata dum la sekvonta estrarkunsido.

5.2.2. KONCIZE.
La malfrua aperado de Koncize estas ĉefe kaŭzita de malfrua transdono de artikoloj kaj de malbona poŝta funkciado en Italio. FLEJA privizore restas ĉe Koncize (por ne perdi la eblecon informiĝi pri IJK). Se Koncize ne aperos ĝustatempe (ne atendi malfruajn transdonojn de redaktoroj) FLEJA influantcele eliros Koncize-n, ĉar ĉiuj klopodoj por plibonigi tiun situacion malsukcesis. Wim komunikos tion en sekvonta kunveno de Koncize.

Nun Koncize havas nur 24 abonantojn (inter kiuj 7 patronaj membroj).
La supra propono estas akceptita (6por, 2 kontraŭ)

6. EKSTERAJ RILATOJ.

6.1. AFS.
Anne atendas principa respondo de Flora Szabó-Felsö por la interŝanĝo de studentoj. Avantaĝe estas ke AFS mem havas kontaktojn kun diversaj internaciaj asocioj kaj havas fortan strukturon.

6.2. BEMI.
Ilse esploris dum unu jaro ĉu BEMI ankoraŭ havas viv-povon. Ŝi serĉas adresojn de asocioj (biciklistaj kaj turistaj) kiuj povas doni mapojn pri biciklovojoj por ebligi la eldonadon de maparo eŭropa biciklovoja.
Biciklokaravanoj okazos el Aix-en-Provence (Francio) kaj Anglio por atingi la UK-on en Antverpeno.

6.3. Pasporta Servo
En 1981 vendiĝis 12 gastigantlibroj. Estis pli da gastigantoj ol da membroj. Nun Ite atendas informojn pri la nunjara maniero de vendado. FLEJA aĉetos du librojn por vendi ilin al personoj kiuj venas en GCA. Ite emfazas ke tiuj libroj estu konsiderataj kiel personaj membriloj.

6.4. Flandra Movado.
Pri la KER-seminario en Lille pri etnaj minoritatoj, TEJO aldonas raporton en la franca, angla kaj Esperanto. Por proponigi tiun ĉi raporton al la flandra movado (kiu konsciiĝas pri lingvaj problemoj) ĝi nepre aperu nederlandlingve. Patrick Boets povus fari la tradukon. Por ebligi tion, TEJO petos financan helpon. FLEJA disponigos al TEJO maksimume 3000 BF (aprobite de la 7 anoj). Anne proponis altiradon de patronaj membroj kiuj donacante 1000 BF ricevos tiun ĉi raporton.

7. VARBADO.

7.1. Ekstera varbado.
La eblecoj kaj personoj estos ekzamenitaj por prizorgi informvesperojn pri Esperanto en SFINX (Kultura Centro en Boechout kun kritikema publiko) kaj ĉe YMCA.
Prezentado de FLEJA al kursanoj ĉe la diversaj flandraj grupoj. TAskitoj : Anne, Ite kaj Jean Pierre.

7.2. Interna varbado :
Myriam esploros la eblecojn pri la farigado de insignoj pli malgrandaj.
Ankaŭ esto faritaj samgrandaj insignoj kun alia desegno.
Okaze de la sekvonta estrarkunveno estos decidite ĉu FLEJA eldonos novajn



faldfoliojn.

8. DIVERSAĴOJ

8.1. Kasedoj por blinduloj
Pro manko de junula publiko ne plu valoras la penon por eldoni JEN-on sur kasedoj. La kasedoj destinitaj al plenkreskuloj (kun ESPERANTO PANORAMA) ne plu eldoniĝas pro administraj problemoj. Pro tio la du revuoj estos surbendigitaj kune sur unu kasedo. Ĉi tiuj kasedoj estos forsenditaj el la GCA kaj FLEJA disponigos la ekspedsakojn por tio.
Personoj kiuj ne resendos la ricevitan kasedon, ne ricevos la sekvontan.
Propono unuanime aprobita.
Ankaŭ FABE helpus en la organizado de la universala kongreso de blindaj esperantistoj en Breda (31 - 07 08 1982), sed ili serĉas kunlaborantojn. Ĝis nun ni oficiale ne proponas iun.

8.2. T-ĉemizoj kaj "Sweatshirts"

8.2.1. T-ĉemizoj
Luc Van Gool faris desegnon kun stelo kies supran pinton formas katedralo kaj kun la mencio ESPERANTOKONGRESO, FLANDRUJO 1982. Decidiĝas ke tiu ĉi desegno taŭgas por T-ĉemizoj, tamen sen la mencio 1982 (evitado de tempolimo), la koloro estos verda sur blanka fono kaj la formo ronda dekoltaĵo.

8.2.2. "Sweatshirts"
Ili konsistas el malgranda blankkolora novfarenda desegno sur blua fono. Tiuj "sweatshirts" estos du-formaj : kun V-dekoltaĵo (3 por, 1 sindeteno) kaj ronda dekoltaĵo (5 por, 1 sindeteno). LA desegno aspektos kiel stelo kun la litero "e" en la centro kaj la mencio de la vorto Esperanto.

Protokolis : Jean Pierre VandenDaele.

---

# F L E J A - E S T R A R O  K A J  T A S K I T O J

Elektitaj okaze de la jarkunveno de 07 03 1982 en Antverpeno.

1.1. Estraro :

Prezidanto : Kristin TYTGAT
Vicprezidanto + administranto: Gerd JACQUES
Financoj : Luc POTIAU
Sekretario : J.P. VANDENDAELE
Kongresoj : Frank PLATTEAU
Eksteraj Rilatoj : Danny VAN DAELE
Rilatoj FLEJA-LKK de la IJK : Wim TYTGAT

1.2. Taskitoj :

Pasporta Servo : Ite TYTGAT
Redaktoroj : JEN Herman DECEUNINCK
KONCIZE Wim TYTGAT
Borsoj kaj kasedoj por blinduloj : Lief CHRISTIAENSEN
BEMI : Ilse JACQUES
TEJO-komitatanoj : Gerd JACQUES k. Kiki TYTGAT

2. Membreco :

2.1. Membrokategorioj en 1981

| Kategorioj | Kotizo | Ricevataj revuoj |
|---|---|---|
| Membro : | 100 BF | JEN, Koncize kaj ESPERANTO PANORAMA |
| Patrona membro | 200 BF | JEN, Koncize |

FLEJA havis en 1981 142 membrojn.

2.2. Kotiz-tabelo :
Helpo al ellaboro de pli simpla kotiztabelo de FEL por 1982, kiu estis enkondukita por 1 jaro kiel provo.

3. Financoj :

3.1. Financa raporto : La libtenado ne estas farita. Eble je la fino de aprilo ĝi estos preta.

3.2. Vojaĝsubvencioj :
Regulo por repago de vojaĝkostoj (totala disponebla sumo : BF 15.000,-)
- laborkunvenoj : repago de la duono de la vojaĝkostoj. Por ĉiuj laborkunvenoj, la disponebla sumo estas BF. 10.000,-.
- estrarkunsidoj : repago de ĉiuj kostoj super BF 100,- (maks. BF 500,-) disponebla sumo : BF. 3.000,-
- vojaĝoj por borsoj, varbado, ktp. repago de ĉiuj kostoj ekde BF 101,- (maks. BF 500,-). Disponebla sumo : BF 2.000,-.
- internaciaj semajnfinoj kaj kunvenoj aliaj ol supre : kompleta repago



laŭ ricevitaj subvencioj por repago de la vojaĝkostoj (ekz. Hoher Knüll).

4. Statutoj kaj Regularo de Interna Ordo.

4.1. Statutoj : Okazas du ŝanĝoj al § 2; ĝi finfine fariĝas : "La sidejo de la asocio estas lokita en Antverpeno, Frankrijklei 140, sed povas esti translokigita ien ajn en la nederlandlingva parto de Belgio kaj Bruselo." Tiuj ĉi ŝanĝoj aperis en la Belga Ŝtatgazeto de 26 11 1981.

4.2. Regularo de Interna Ordo : - vidu aldonon.

5. Rilatoj :

5.1. Rilatoj kun TEJO

5.1.1. TEJO-komitatanoj : Gerd Jacques kaj Kiki Tytgat (kun infomroj al Albert Dekker).

5.1.2. Bob Venhuizen, TEJO-estrarano pri kongresoj, aktive helpas al LKK kaj FLEJA rilate la preparojn por la IJK '82.

5.1.3. Gerd Jacques partoprenis dum la IJK en Meksiko la TEJO-komitatkunsidojn kaj Bob Venhuizen anstataŭis Kiki Tytgat.

5.2. Rilatoj kun FEL.

5.2.1. Por plifaciligi la rilatojn inter la junulara kaj plenkreskula movado, Kiki Tytgat eniris la estraron de FEL.

5.2.2. En 1981 FLEJA havis la eblecon kundiskuti pri FEL-problemoj : i.a. pri la celo de la revuo INFORMILO, la nova kotiztabelo ktp.

5.2.3. Ekzistas regula fluo de informoj, ĉar ĉiuj FEL-estraranoj ricevas la FLEJA-protokolojn kaj inverse.

5.2.4. Okazis komuna kunsido FEL/FLEJA je 22 08 1981 en Antverpeno kun la ĉefcelo eviti ke taskoj estu faritaj dufoje, nome en FEL kaj en FLEJA.

5.2.5. FEL-estraro kunsidis en la FLEJA-semajnfino en Lichtaart.

5.3. Rilatoj kun NEJ
Gerd Jacques kunlaboris kun NEJ por prizorgi la aliĝon de FLEJA-aktivuloj al la laborsemajnfinoj en Nederlando (vd. 11.1)

5.4. Rilatoj kun ILEI
FLEJA kunlaboris por la dua fojo kun ILEI kaj la Brusela Esperanto-grupo en la organizado de Esperanto-stando je 08 03 1981 en la Galerio Ravenstein en Bruselo okaze de la Borso de Fremdaj lingvoj (vd 11.2.).

5.5. Rilatoj kun BEMI
Por ebligi la eldonadon de mapo pri biciklovojoj de Eŭropo, Ilse Jacques demandis informojn tiurilate al ĉiuj belgaj provincaj turistaj servoj.

Ŝi ankaŭ ebligos la reaperadon de BEMI-revuo, kiu eldoniĝos certe antaŭ IJK-Leuven.

6. Kunsidoj :

| | | |
|---|---|---|
| 6.1. Jarkunveno : | 07 03 1981 | Antverpeno |
| 6.2. Estrarkunsido | 05 04 1981 | Ede (Nl.) |
| 6.3. " | 29 05 1981 | Leuven, pri la IJK |
| 6.4. " | 25 07 1981 | Antverpeno |
| 6.5. " | 22 08 1981 | " |
| 6.6. " | 03 10 1981 | Bruselo |
| 6.7. " | 31 10 1981 | Lichtaart. |

7. Interna Informado

7.1. En la estraro :

7.1.1. Kiki Tytgat sendis leteron al la tuta estraro la 6-an de julio 1981

7.1.2. Wim kaj Kiki Tytgat kaj Gerd Jacques regule ĉeestas la IJK-kunsidojn kaj raportas pri ili al la aliaj estraranoj.

7.1.3. Jean Pierre VandenDaele ekdungiĝis en la Esperanto-Centro en la aŭtuno. Tiel la kontaktoj ege plifaciliĝas.

7.1.4. Luc Potiau foriris eksterlanden sen informi la estraron sufiĉe (nova adreso, forestoperiodo, stato de la FLEJA-financoj) kaj Danny Van Daele soldatservas sen informi la prezidanton pri sia periodo de foresto.

7.1.5. Laŭ Kiki Tytgat multaj farendaĵoj rilate al FLEJA realiĝas en la Esperanto-Centro, dank'al al la aktivuloj tie. Bedaŭrinde nur estas, ke tio ofte okazas sen ke la aliaj estraranoj estas sufiĉe informitaj pri ĉio. La agado jes okazas, sed ne la fluo de informoj (pro manko de tempo por prizorgi tion en la Centro), tiel ke povas esti malfacile por kelkaj estraranoj ankoraŭ sekvi la tuton kaj mem aktivi.

7.1.6. Kontakto kun junaj kursanoj okazas en Antverpeno regule en la vesperkurso kaj ni sendas revuojn kaj invitojn al la aliaj, de kiuj ni havas la adreson. Ankaŭ dum kongresoj (ekz. Lichtaart) ni havas kontaktojn.

7.2. JEN

7.2.1. ENHAVO : en JEN aperas artikoloj pri i.a. Esperanto kaj ĝiaj aplikadoj, lingvaj problemoj, junularaj kongresoj, Esperanto-asocioj kaj la rilatoj kun la Eŭropa Parlamento.

7.2.2. EK : aperas kiel aldonaj paĝoj en JEN, destinitaj por junuloj sub 16-jaraj. Anne Tilmont neatendite transprenis la redaktadon, kvankam ŝi ne havas spertojn. Ŝi daŭrigos skribi simplajn tekstojn kaj ŝercojn por la juna publiko, kion Oliva Van Eeghem faris antaŭe. Montriĝas ke ankaŭ aliaĝa publiko (dekkelkjara) legas EK. Pro tio Anne ekverkos krom receptojn ankaŭ amatoraĵojn. Evidentiĝas ke klara gvidilo mankas kaj ke helpo estas bezonata.



7.2.3. Respondeculoj por la redaktorado estas Herman Deceuninck kaj Henk Diender En GCA (Grafika Centro Antverpa) presiĝas JEN kaj Gerd Jacques kromlaboras por la pretigado al la presado.

7.2.4. Ricevas JEN 389 personoj.

7.2.5. FLEJA-leteroj : propono por aperigi, kiam necese, FLEJA-leterojn pri ĝeneralaĵoj de nia agado, kune kun la protokoloj en INFORMILO. Ĝis nun, tio ne realiĝis.

7.2.6. Problemoj : En 1981 aperis nur 4 numeroj. Pro manko de laborfortoj JEN ne povas regule kaj ĝustatempe aperi. Por allogi novajn kunlaborantojn, estis alvoko por skribi artikolojn. Necesas interkonsentoj kaj starigado de laborskemo, konsiderante la aliajn aktivecojn de GCA.

7.3. Koncize :

Wim Tytgat zorge kaj detale prizorgas la FLEJA-paĝon en Koncize. Malofte bedaŭrinde li ricevas kontribuojn de la aliaj membroj. Koncize havas 139 abonantojn. Por JEN kaj Koncize ni havas nun stampilon.

8. Eldonaĵoj.

FLEJA havas malnovajn naskiĝtagkalendarojn kaj varbfoliojn de kiuj ni havas ankoraŭ stokon. Ankaŭ insignojn. Ni nur posedas unu ekzempleron de vojaĝkalendaro, ĉar tion transprenis JEN.
Kiki Tytgat aldonis al la jarraporto 1980 liston de mallongigoj, por plifaciligi la legadon de la protokoloj.

9. Oficejo

Nuntempe 2 personoj de la nuna estraro laboras en la Esperanto-Centro. Gerd Jacques ne laboras por FLEJA dum la deĵorhoroj. Jean Pierre laboras por GCA, tuttage en BTK (speciala kelktempa kadra) projekto. Se estas ankoraŭ iom da tempo, li rajtas la labori por FLEJA.
Fakte ne restas tempo por fari taskojn dum la oficejaj horoj.
Superrigardo de aferoj kiuj estas faritaj de ili du : korespondado letera, arĥivado, subvencipetado, protokolado, invitado al kunvenoj, rilatoj kun TEJO, la tuta laboro por JEN, forsendado de Koncize kaj organizado de kongresoj.

10. Renkontiĝoj.

10.1. Hoher Knüll : 05 - 09 06 1981 en FR-Germanio kun vojaĝsubvencioj. La semajnfino estis GEJ-FLEJA-aranĝo. Temis pri loka kaj internacia junul-

ara laboro.

10.2. Lichtaart : 30 10 - 01 11 1981, 120 partoprenantoj (inter kiuj 41 Flandroj), temo : instruado. Tiu ĉi semajnfino estis FLEJA-NEJ-aranĝo.

10.3. IJK : preparoj por la IJK, 31 07 - 07 08 1982 en Leuven, kune kun LKK.
- pretigo de unuaj informilo kaj aliĝilo kun fiksado de la kotiztabelo + distribuo de ili.
- vizito al la kongreskonstruaĵoj
- ekzameno de interŝanĝoj kun socialismaj landoj
- kontrakto inter LKK kaj FELJA rilate (mal)profiton de IJK
- alvoko al volontuloj por fari taskojn dum la kongreso
- propono de poŝtstampo

10.4. UK : Gerd preparos kun la LKK la junulartagon dum la UK. Ŝi estas komisiito pri junularaj aferoj.

10.5. Hungara Esperanto-Infankongreso : FLEJA finfine ne partoprenis ĝin pro manko de partoprenantoj el Flandrio.

10.6. IJK en Oaxtepec 81 (Meksikio) : Gerd Jacques kaj Bob Venhuizen partoprenis tiun ĉi kongreson.

10.7. FLEJA reprezentiĝis dum la TEJO-seminario en Strasburgo (Frank Platteau kaj Herman Van Eyndt) pri "Nova Ekonomia Ordo" de 30 05 - 06 06 1981 kaj dum la KER-seminario en Lille (F) (Kriŝtin Tytgat, Gerd Jacques kaj Patrick Boets) de 19 - 26 09 1981 pri "etnaj minoritatoj".

10.8. Preparoj por FLEJA-renkontiĝo en Lichtaart en 1982, kiu daŭros unu tagon pli. Ĉefrespondeculino : Gerd Jacques.

11. Eksteraj Rilatoj - Varbado.

11.1. En 1981 okazis du laborsemajnfinoj en Nederlando (17 - 18 01 1981 en Hoeven kaj 04 - 05 04 1981 en Ede.) La partoprenantaro laboris en kvar grupoj : varbado, instruado, aplikado kaj eksteraj rilatoj. Raportoj pri la labroroj estas faritaj. Pro manko de intereso; la laborsemajnfino en Hago (12 - 13 09 1981) ne okazis. Kadre de la laborgrupo "Ekstero" Danny Van Daele forsendus informleterojn pri Esperanto al multaj organizaĵoj. Verŝajne tio ne okazos pro la soldatservdevigo de Danny. Li cetere ne sciigis tion al ni.

11.2. La 8-an de marto 1981 okazis Borso pri Fremdaj Lingvoj en Bruselo kun Esperanto-stando.

11.3. Partopreno de Gerd Jacques kaj Anne Tilmont al la semajnfino pri Informado en Rotterdam, 16 - 18 10 1981. Redaktiĝis raporto. Estis 2 grupoj :
- vojoj kaj projektoj (i.a. amaskomunikiloj, pedagogiaj kaj edukaj medioj, (i.a . turismaj medioj) kaj
- iloj (i.a. pri junulara afiŝo, seslingva faldfolio, internacia fotoserio)

Interesitoj povas akiri raporton pri tiu semajnfino.



11.4. AFS
Anne Tilmont havis kontaktojn hazardajn kun Anne Vangansbeke (respondeculino de AFS en Bruselo). AFS prizorgas la interŝanĝon de studentoj dum ferioj aŭ dum unu jaro. La centro de AFS troviĝas en Usono, tamen en Eŭropo fondiĝas aparta, pli aŭtonoma sekcio, nome EFIL. Ili serĉas kontaktojn en orienta Eŭropo, eventuale pere de Esperanto. Kontaktiĝis S-ino Szabó - Felsö (UEA-sekretariino) el Pecs (Hungario), sed Anne atendas konkretan informon de tie. AFS ankaŭ interesiĝus pri la Semajno de Internacia Amikeco kadre de sia soci-kultura programo en Belgio, favore al la ĉi tie loĝantaj eksterlandaj studentoj.

11.5 "Cultureel Jongerenpaspoort" ricevos rabaton por JEN.

12. Diversaĵoj :

12.1. Kasedoj por blindulo.
Dum la tuta jaro Anne Tilmont laŭtlegis JEN, KOncize-kaj parte Esperanto-Panorama-n por son-registrado. Pro manko de intereso, tiu projekto ne plu daŭriĝas : JEN havas malmulte da abonantoj, tamen ja estas plenkreskulaj simpatiantoj. Por Esperanto-Panorama estas administraj malfacilaĵoj. Nun Anne okazigas intertraktojn por kombini ĉiujn revuojn sur unu kasedo. Ŝi ĉeestos ankaŭ la jarkunvenon de FABE.

12.2. Infan- kaj junulĉambro en Esperanto-domo en Antverpeno:
Tiu ĉi ĉambro povas esti uzata por infanoj kaj junuloj, kiel ludejo aŭ kunvenejo. Ni demandis kiu havas ideojn por aktivecoj kaj instalado de tiu ĉambro.

12.3. Farado de novaj T-ĉemizoj de FLEJA okaze de la KOngresoj.
Eldoniĝos T-ĉemizoj kaj "Sweatshirts" kun la mencio "Esperantokongreso-Flandrujo".

12.4. Leterpapero de FLEJA.
La estraro jam konsentis pri la desegno de la papero. Skizo kaj muntado estas faritaj, la leterpapero estas presoreta.

12.5. Turismo
Esplorado de eblecoj por kunlaborado kun junularaj turismaj entreprenoj. Tamen ekzistas problemoj pri la forveturado kaj reveno je la sama momento. Evidentiĝas, ke tio ne eblas. Mariken Creuwels transprenis tiun taskon.

12.6. Pasporta Servo.
En 1981 estis en Flandrujo 8 gastigantoj; en Bruselo 3. 2 personoj petis loĝlokojn en Antverpeno kaj Bruselo. Ite okupiĝas pri tio.

---

INTERNA REGULARO - propono

1. Membroj :

1.1. Membreco akiriĝas pere de simpla pago de la kotizo.

1.2. La membrokategorioj de FLEJA estas :
- ordinara membro (JM)
- patrona membro (PM)
- asocia membro (AM)
- kursano (K)

1.3. Nur la personoj el la kategorioj JM, K havas voĉdonrajton en la ĝenerala asembleo.

1.4. Aliĝo de grupoj : ĉiu junulargrupo, kiu deziras aliĝi al FLEJA petu tio skribe al la sekretario de FLEJA. La peto devas esti subskribita de du estraranoj de la petanta grupo. Al tiu peto estu aldonita kompleta listo de la estraro de la grupo kaj la statutoj de la grupo.

2. Administrantaro :

2.1. La administrantaro estas elektita de la ĝenerala asembleo laŭ la principoj de art. 10-a de la statuto.

2.2. Procedo :
Volontuloj kandidatiĝas okaze de la elekto de la nova administrantaro. La ĝenerala asembleo elektas ĉiun kandidaton aparte pere de manlevo. La voĉo de la gvidanto de la ĝenerala kunsido decidas en kazo de voĉegaleco.

3. Estraro :

3.1. La ĝenerala asembleo elektas la estraron el la administrantoj laŭ la principoj de art. 12 de la statuto.

3.2. Procedo :
Kandidatoj prezentas sin okaze de la sekreta elekto de la nova estraro. Tiu estraro estas elektita grupe. La protokolanto organizas la voĉdonadon. Ĉe voĉegaleco la protokolanto organizas duan sekretan elekton. Kiam li denove konstatas voĉegalecon, li orgaizas sekretan voĉdonadon pri la kandidatoj individue.

3.3. La administrantoj elektas la prezidanton el la elektitaj estraranoj. Procedo : vidu 2.2.

4. Voĉdonado dum estrarkunsidoj :
Ĉiuj ideoj estas alprenataj per simpla plimulto de la voĉoj, escepte en la laŭleĝe antaŭviditaj kazoj. Ĉe voĉegaleco, la voĉo de la prezidanto estas decidiga.



5. ĜENERALA KUNSIDO -procedo

5.1. Akcepto de la gvidanto kaj protokolanto de la kunsido. Kontrolo de membreco.

5.2. Akcepto de la tagordo.

5.3. Akcepto de la protokolo de la antaŭa ĝenerala kunsido.

5.4. Prezentado de la jarraportoj + akcepto.

5.5. Liberigo de la respondecoj de la estraro kaj administrantaro.

5.6. Elekto de nova administrantaro

5.7. Elekto de nova estraro

5.8. Elekto de la prezidanto.

5.9. Diversaĵoj.

Propono de la komisiono pri interna regularo.

Antverpeno, la 16-an de septembro 1981.

Luc Potiau    Wim Tytgat.

---

# F A B E

## FLANDRA ASOCIO DE BLINDAJ ESPERANTISTOJ

ĜENERALA JARKUNSIDO OKAZINTA LA 27-AN DE MARTO 1982 EN KORTIJK.

Raportas Anne TILMONT.

Multaj gravaj problemoj pridiskutiĝis, i.a. la katastrofa finaca situacio.

Grava punkto en la tagordo estis la elekto de nova prezidanto por la asocio. Fakte elektiĝis nova prezidantino, nome la ĉiam entuziasma kaj energia S-ino DERYCK-DEPETTER kun la efika asisto de sekretario D. DEBEURME kaj kasisto G. DERUYTER.
Gratulojn ĉiukaze de ambaŭ ĉeestantaj FEL-membroj Cesar Vanbiervliet kaj Anne Tilmont.

Post pridiskuto de la parolata versio de Esperanto-revuoj/kasedoj, oni pritraktis la plej gravan eron de la tagmezo : la organizo de la ĉi-jara Internacia Blindula Kongreso. Kutime ĝi okazas en la sama lando en kiu okazas la UK.
Nu, ĉar la Flandra FABE estas ankoraŭ treege "juna" kaj do malmultnombra, la pli forta organizo el Nederlando (NoSoBe) konsentis transpreni la taskon. La kongreso okazos do en la urbo Breda, ne tro for de la belga landlimo. Tamen FABE devos kunlabori en kelkaj eroj.

Unua problemo estas finfine solvita : post multaj petoj, troviĝis "vidanta" kunhelpanto por iomete helpi en praktikaj taskoj. Temas pri Oliva Van Eeghem el Bruĝo.

Sed, due, FABE devos organizi la tradician ekskurson dum la merkredo de 4-a de aŭgusto por ± 150 blinduloj kaj akompanantoj.

Pro financaj kialoj FABE ne povos mem pagi ĉion. Oni do serĉas :
- subvenciojn por la aŭtobusa vojaĝo
- partopreno en la kostoj de simpla tagmanĝo
- programeroj kiuj taŭgas por la specifa grupo.

Kiu havas konkretajn proponojn de firmaoj, kluboj, organizoj, ŝtataj instancoj kiuj povus helpi, bonvole kontakitĝu kun S-ino Deryck-Depetter, tel. 053/66 97 32

Audiĝis la rimarko, ke ĝis nun preskaŭ ĉiuj subvencipetoj, faritaj al diversaj instancoj restis senrezultaj. Tamen, multe pli grave : la en oktobro pasintjare senditaj leteroj al ĉiuj 24 Flandraj Esperanto-kluboj restis eĉ senrespondaj.
Ŝajnas ke nur 2 (du) respondis ... (Gent kaj Kortrijk).
Jam nur pro ĝentileco respondo estas necesa, eĉ se negativa !.

Anne Tilmont.



Klarigo de la uzitaj mallongigoj.

| | |
|---|---|
| AFS | American Field Service |
| BEMI | Biciklista Esperanto-Movado Internacia |
| EFIL | Eŭropean Federation for Intercultural Learning |
| FABE | Flandra Asocio de Blindaj Esperantistoj |
| FEL | Flandra Esperanto-Ligo |
| FLEJA | Flandra Esperanta Junulara Asocio |
| GCA | Grafika Centro de Antverpeno |
| GEJ | Germana Esperanto-Junularo |
| IJK | Internacia Junulara Kongreso |
| ILEI | Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj |
| JEN | Junulara Esperanto-Novajoj |
| JM | Junulara membro |
| KER | Komisiono pri Eksteraj Rilatoj |
| LKK | Loka Kongresa Komitato |
| NEJ | Nederlanda Esperanto-Junularo |
| TEJO | Tutmonda Esperantista Junulara Organizo |
| UEA | Universala Esperanto-Asocio |
| UK | Universala Kongreso |
| YWCA | Young Womans Christian Association. |